# ESPERANTOLOGIO

INTERNACIA REVUO POR LA LINGVISTIKO KAJ BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTO

Vol. I (p. 81—144) Junio 1950 N-ro 2

Redaktata de d-ro PAUL NEERGAARD, Ak., Kopenhago, Danlando.

*Redakta komitato:* Profesoro, d-ro BJÖRN COLLINDER, Uppsala, Svedujo • profesoro, d-ro W. E. COLLINSON, Liverpool, Britujo • docento, d-ro KALOMANO KALOCSAY, Ak., Budapest, Hungarujo • profesoro NAOKAZU KAWASAKI, Ak., Osaka, Japanujo • profesoro S. LA COLLA, Ak., Milano, Italujo • d-ro WALTER LIPPMANN, Ak., New York, Usono • d-ro W. J. A. MANDERS, Venlo, Nederlando • profesoro, d-ro EDMOND PRIVAT, Ak., Neuchatel, Svislando • profesoro, d-ro G. JOHN RAMSTEDT, Helsinki, Finnlando • magistro VILHO SETÄLÄ, Ak., Helsinki, Finnlando • profesoro G. WARINGHIEN, Ak., Tours, Francujo • d-ro-inĝ. EUGEN WÜSTER, Wieselburg, Aŭstrujo.

ENHAVO

W. E. COLLINSON: The Internationality of some Esperanto Affixes ........ 81

N. KAWASAKI: Esperantigaj principoj de japanaj vortoj ...... 89

F. I. WIENER: Ĝemelaj radikoj ........ 98

LEO BLAAS: Statistiko de 50 000 tekstvortoj ........ 107

PAUL NEERGAARD: Bibliografio de esperantologia literaturo 1940—1948 (II) ........ 133

Referatoj. Recenzoj (MANDERS: Interlingvistiko kaj esperantologio, 1950) ........ 137

Notoj (Universitataj katedroj de Esperanto II, Ricevitaj publikigaĵoj, k. a.) ........ 142

EINAR MUNKSGAARD • PUBLISHER • COPENHAGEN • DENMARK

**ESPERANTOLOGIO** Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto.
Adreso (abonoj, redakciaj aferoj) / Address (subscriptions, editorial matters): D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago/Copenhagen K, Danujo/Denmark.

ESPERANTOLOGIO aperas per kajeroj 48—80-paĝaj formantaj volumojn 250—300-paĝajn. La kajeroj estas eldonataj laŭ la cirkonstancoj, unu volumo probable kovranta ĉ. tri jarojn. La abonpago por unu volumo estas 25 ŝilingoj anglaj aŭ 5 us. dolaroj aŭ 25 danaj kronoj.
La revuo estas destinita por la studo de Esperanto kaj akceptas traktaĵojn bazitajn sur originalaj esploroj el la kampo de la Esperanta lingvistiko inkludante i. a. fonetikon, leksikologion, etimologion, sintakson, stilistikon, lernopsikologion kaj bibliografion.

*La respondeco* pri asertoj, ĉu temas pri faktoj aŭ opinioj, restas tute ĉe ties aŭtoroj.

ESPERANTOLOGIO appears in issues of 48—80 pages, forming volumes of 250—300 pages. The issues will come out according to circumstances, one volume covering probably about 3 years. The subscription for one volume is 25 shillings, 5 dollars or 25 Danish crowns.
The journal is devoted to the study of Esperanto and accepts papers based on original research in the field of Esperanto linguistics including e. g. phonetics, lexicology, etymology, syntax, stylistics, psychology of learning and bibliography.

*The responsibility* for statements, whether of fact or opinion, rests entirely with the writers thereof.

## INSTRUKCIOJ
por kunlaborantoj de
ESPERANTOLOGIO

1) *Manuskriptoj* proponataj por publikigo kaj komunikoj pri redakciaj aferoj estu sendataj al la redaktoro D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K, Danlando.
2) Manuskriptoj estu verkitaj en Esperanto, angla, franca aŭ germana kaj tajpitaj kun duobla interlinia spaco sur nur unu flanko de ne tro maldika papero, kun sufiĉe larĝa marĝeno ĉe la maldekstra flanko de la paĝo. Ili prefere estu sendataj duekzemplere por ŝpari tempon ĉe la prijuĝado. Kontribuaĵo enhavanta lingvajn aŭ formalajn erarojn povas esti resendata al la aŭtoro por korektado.
3) Traktaĵoj jam publikigitaj en unu el la supre menciitaj lingvoj aŭ aliloke prikonsiderataj ne povas esti akceptataj.

**[daŭrigota sur p. 3 de la kovrilo]**

## INSTRUCTIONS
for Contributors to
ESPERANTOLOGIO

1) *Manuscripts* submitted for publication and communications concerning editorial matters should be sent to the editor, Dr. Paul Neergaard, Gothersgade 158, Copenhagen K, Denmark.
2) Manuscripts must be written in Esperanto, English, French or German and must be typed double space on one side only of a not too thin paper, with a fairly wide margin on the lefthand side of the page. It should be sent preferably in duplicate in order to save time in judging. A paper containing language or formal errors can be returned to the author for correction.
3) Papers already published in one of the above mentioned languages or under consideration elsewhere cannot be accepted.

**[continued on p. 3 of the cover]**

4) Ni rekomendas, ke traktaĵo estu dividata en sekciojn, ĉiu provizata per titolo. Klareco kaj koncizo estas esencaj.

5) Bibliografiajn referencojn indiku per la nomo de la aŭtoro sekvata per la jaro: (Moch 1907) aŭ Moch (1907). La bibliografion oni metu en la fino de la artikolo aranĝatan alfabete kaj kun ĉiu indiko redaktata jene:

Moch, Gaston, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.

6) Ni presigas ĉiujn ekzemplojn pri vortformoj *kursive*, kaj tiajn ekzemplojn oni bonvolu substreki en la manuskripto (ne substreku ion alian). Se la aŭtoro deziras emfazi nemultajn gravajn vortojn aŭ frazojn koncizajn, oni substreku tiujn ĉi per rompita linio, kaj ili estos presataj interspacigite. Ĉiuj personaj nomoj estas presataj per malgrandaj ĉefliteroj: Moch, kaj povas esti tajpataj tute per ĉefliteroj: MOCH.

7) Oni finu la artikolon per konciza kaj klara resumo redonanta la plej gravajn punktojn de la teksto.

8) La aŭtoro ricevas du presprovaĵojn de sia artikolo. Korektoelspezoj, kiuj superas 10 % de la kosto de la kompostado, devas esti pagataj de la aŭtoro.

9) La redaktoro bedaŭras ne povi honorarii artikolojn akceptitajn.

10) *Represaĵoj.* Ĉiu kontribuinto ricevas 2 ekzemplerojn de la kajero enhavanta lian artikolon. Senkostaj represaĵoj ne estas je dispono. Tarifo estas ĉemetata al la presprovaĵo kaj la aŭtoroj povas mendi represaĵojn plenigante kaj resendante ordonan formularon.

4) It is recommended that papers be divided into sections, each headed by a caption. Clearness and conciseness are essential.

5) Text references should be made using author's name followed by the year: (Moch 1907) or Moch (1907). The bibliography should be placed at the end of the article and arranged in alphabetical order. Eeach item should be set out as follows:

Moch, Gaston, 1907: Pri la transskribo de la propraj nomoj en Esperanto. Unua raporto. — Of. Gaz. Esp. 2: 58—89.

6) We print all examples of word-forms with *italics*, and such examples should be underlined in the manuscript (do not underline anything else). If the author wants to emphasize a few important words or short sentences these should be underlined with a broken line and will be printed with spaced type. All personal names are printed with small capitals: Moch, and may be typed entirely with capitals: MOCH.

7) The article should conclude with a short, clear summary reviewing the important points in the text.

8) The author receives two proofs of his article. Correction costs which exceed 10 % of the type-setting costs must be paid by the author.

9) The editor regrets not to be able to pay any fee for articles submitted.

10) *Offprints.* Each contributor will receive 2 copies of the issue in which his article is published. No gratis offprints will be supplied. A printed schedule of prices is submitted with the proof and authors may secure offprints by placing an order on the blanks provided when proof is returned.

# The Internationality of some Esperanto Affixes

by W. E. COLLINSON, M. A., Ph. D.*)

Dr. ZAMENHOF was certainly an accomplished linguist. From his childhood in Byalostok till his untimely death he devoted much time to language in spite of the calls of his medical studies at Moscow and of his professional practice as an oculist at Warsaw. In a letter written on 21st February 1905 to M. MICHAUX, president of the Boulogne Esperanto Group, and quoted for the first time on pp. 579 ff. of the Enciklopedio de Esperanto vol. II he tells us that he could speak freely Russian, Polish and German, that he could read French easely, though he could not speak it and that he had some acquaintance with eight other unspecified languages. He says that he was particularly fond of Russian. At the age of fourteen he embarked on the study of Latin and Greek, and subsequently he learnt to appreciate the simplicity of English accidence.

In his Vivo de Zamenhof — which has been translated from Esperanto into English — Dr. PRIVAT relates the story of how Dr. ZAMENHOF came to realize the value of suffixes in minimizing the effort required to master vocabulary. While a pupil at the Gymnasium he noticed as he walked down the street that the word *svejcarskaja* was used for conciergerie or porter's lodge and *konditorskaja* for a confectioner's shop. The repetition of *-skaja*—actually a feminine adjectival ending—made him think that a few suffixes could greatly multiply one's store of words. We are reminded of the Old Testament story of the widow's cruse which was always replenished. In his first project of 1878, subsequently much modified, ZAMENHOF was already using the suffixes *-ig, -et* (in the abstract *malamikete* 'enmity' subsequently replaced by *-ec*) and *-oz* (in the collective *homoze* subsequently replaced by *-ar*).

*) Professor of German, and John Buchanan Lecturer in Esperanto, University of Liverpool.

Some of the current Esperanto word-forming affixes appear at first sight unfamiliar to the western nations, but a closer scrutiny usually shows their justification. Most of them have a remarkable range of internationality with points of attachments in several heterogeneous languages. It may be that Dr. ZAMENHOF was not always aware of their wider connections and that subconscious memories of the many languages he studied may have played their part. Whether introduced intentionally or not on account of their international connections, many affixes give valuable mnemonic aid to the speakers of many different ethnic languages.

Before discussing affixes in the stricter sense it may be noted that Esperanto provides a very convenient instrument for forming new words in its part-of-speech endings. The *-o* of the substantives recalls the masculine ending of the southern Romanic languages, though there are also cases like Italian *la mano* with strike a familiar note. The adjective ending *-a* is like that of the feminine singular in many of the Romanic languages and also has a chance counterpart in the weak form of the Swedish adjective, e. g. *den goda mann* 'la bona viro'. What is more important is the capacity for making adjectives at pleasure from substantival roots (*hom-* 'human being' > *homa* 'human'), verbs (*parol-* 'speak' > *parola* 'oral') and adverbs (*post* 'after' > *posta* 'subsequent, posterior'). Even English is not so prolific of such second-rank words (to use JESPERSEN'S term) as Esperanto, though we do use such loose attributes as *a gold watch, the London train, a don't care attitude* etc., the preposed order being equivalent to the Esperanto *-a*. Russian makes a considerable use of *-nyï* to form adjectives from substantives much as in Esperanto, e. g. *literatūrnyï* 'literary', *proporcïnyï* 'proportional', *pártinyï* 'partisan', *parlamentarnyï* etc. The adverbial *-e* was no doubt suggested by such Latin words as *bene* 'well' *(bone), mane* etc. but was supported by the use of *-e* in such well known German adverbs as *lange* and *nahe.* The specific local use of *-e* in *tere* 'by land, on the ground' has an analogue in the Lithuanian locative case in -è, e. g. *paštė* 'at the post' (cf. *poŝte* 'by post').

The infinitive has a vowel ending as in Latin *-āre, -ēre* etc. and the deponents *uti* (uzi), *fungi* (funkcii) etc., French *aimer (εme)* and the Scandinavian languages, e. g. Norw. *elske.* The vowel *-i* is found in the infinitives of Lithuanian in *-ti (miegoti,* cf. *dormi)* and the Magyar in *-ni (aludni,* cf. *dormi).*

Among the prefixes *dis-, eks-* and *re-* are wide-spread internationally and are of Latin origin. The prefix *bo-* to indicate relationship by marriage is generalized from the French masculine *beau* in *beau-père.* Some languages break the system of nomenclature in particular examples, e. g. Fr. *bru* 'daughter-in-law' *(bofilino)* or Ger. *Schwager* 'brother-in-law' (bofrato). English with its appended *-in-law* (and by loan-translation Welsh *-yng-ghyfraith*) is as regular as Esperanto.

The use of *mal-* as a prefix to indicate the contrary appears to us Westerners a little anomalous except in cases like *malsana, malhonesta* which tally closely with the French *malsain, malhonnête.* One cannot help wondering whether Dr. ZAMENHOF was influenced by the Russian *málo* 'little, few' (cf. *malgranda, malmultaj)* which is used to form many opposites, e. g. for 'slow', 'low', 'cheap', 'poor' when Esperanto has *malrapida, malalta, malkara* and *malriĉa* respectively. Several languages economize on new words by using — though not to the extent of the Esperanto *mal-* — a negative prefix to form opposites, e. g. Lettish *neilgs* 'short' *(mallonga), nelābs* 'ill' *(malbona)* and cf. Ger. *ungut, unschön, Untiefe, unfern, unweit* existing side by side with separate roots *hässlich, nah* etc. The *ne-* of the Baltic languages is not simply negative in function (as in Esperanto *neutila),* but is a true prefix of contrariety.

The prefix *mis-* is taken from the Germanic languages, cf. Ger. *missverstehen,* Eng. *misunderstand,* Esp. *miskompreni.* In the Romanic languages it is crossed with a *mis-* (thus in Italian, but *mé-* in French) from the Latin *minus,* cf. Sp. Port. *menosprizar* equivalent to the French *mépriser.*

{Hisp. menospreciar} {Port. menosprezar}

The verbal prefix *ek-* indicates the momentaneous, ingressive aspect i. e. the sudden onset of an occurrence. It is somewhat reminiscent of Lat. *ex-,* in *exclamare,* and of French *s'écrier, éclater.* Several European languages have specific affixes for

this purpose and perhaps the German *erklingen, erkennen* (side by side with *entflammen, aufleuchten, ausrufen* etc.) helped. Where as Russian uses — like German — prefixes (especially *v-*, literally 'in', cf. Gothic *in-brinnan* 'ekbruli'), Finnish has a special suffix *-ahtaa/ähtää*, e. g. *huudahtaa* 'exclaim' *(ekkrii)*, *välähtää* 'flash' *(ekbrili)*.

It is more convenient to list the suffixes in alphabetical order selecting those for commentary which appear to have a wider international range.

**-ad**

from substantival roots *-ad* forms nouns of action much like the English *-ing* or *-tion*, e. g. *krono* 'crown' > *kronado* 'crowning, coronation'. With verbal roots already designating a process *-ad* gives them a continuative or iterative meaning, e. g. *pafi* 'to shoot > *pafo*' 'a shot', but *pafado* 'shooting, fusillade'. The suffix is internationally known through *fusillade, cannonade* etc. An unsuspected parallel to Esp. *-ad* to form nouns of action is the Welsh suffix in *mwynhâd* 'enjoyment', *(ĝuado)*, *gweithrediad* 'action' (agado) etc. Dr. Zamenhof may not have known the Celtic parallel, but may well have remembered the Russian way of forming iterative verbs by a form ending in *-at'*, e. g. *znavát'* 'to meet frequently' *jedát'* 'to live well (eat a lot)'. Finnish uses *-ella/-ellä* e. g. *laulella* (kantadi), *oleskella* (restadi, really estadadi!) to form frequentative and continuative verbs.

**-ar**

the collective suffix in *libraro, vortaro* no doubt originated in Lat. *-arium* (*glossarium, herbarium* etc.) with its Romanic descendents in It. *-ario*, Fr. *-aire*, Engl. *-ary* etc. It is, however, remarkable that the word *vortaro* has an exact parallel in the Russian *slovar'* from *slov* 'word'. Other languages have collective suffixes, but do not use them so extensively as Esperanto except possibly Finnish with *-sto*, e. g. *laivasto* 'fleet' (*ŝiparo*), *kirjasto* 'library' *(libraro)*, *sanasto* 'dictionary' *(vortaro)* etc.

**-ec**

the suffix to form abstract nouns from adjectival roots was probably suggested by the Italian *-ezza* e. g. *grandezza* (grand-eco), *giovinezza* (juneco). This with French *-esse* in *jeunesse,* Port. *-eza* in *probeza* etc. comes from the Latin *-itia.* In no language other than Esperanto is there any single suffix universally applied to form abstracts, but Ger. *-heit* and Engl. *-ness* can still be used to form new words. Otherwise the abstracts show a bewildering variety of suffixes, cf. Engl. *grandeur, utility, nationhood, friendship, freedom* etc. Finnish makes an extensive use os *-us/-ys,* e. g. in the equivalents of 'freedom', 'height', 'beauty', 'cleanness', 'laxity', 'brotherhood', 'goodness', 'honesty', 'mastery'. Lithuanian has a widely used *-ùmas,* but in addition the rather more concrete *-ỹbe* (nearer the Esperanto *-aĵo* e. g. beauty/a beauty, ugly/a horror, vitality/life).

**-ej**

the place-suffix used with substantival, adjectival and verbal roots, recalls German *-ei* in *Detektei, Auskunftei,* especially after the suffix *-er* in *Bäckerei, Bücherei.* The Dutch counterpart in *-ij* in *maatschappij* comes near the Esperanto sound. The suffix comes from Latin *-ia.* As Dr. WIENER reminds me, the Polish *-skaja* mentioned in the second paragraph may have given the first impetus, for the German equivalents of the words cited are *Schweizerei* and *Konditorei.* It has, however, chance echoes in other languages, e. g. modern Greek *-eîon* (pronounced -îon) e. g. *kapheneîon* (kafejo), *telōneîon* 'customs house' (*doganejo*) and we are all familiar with *museum, Lyceum, Athenaeum* from ancient Greek words with a similar suffix. French has an unsuspected partial parallel in a suffix *-aie* Lat. *eta,* indicating a plantation of trees or a bed of plants, e. g. *chênaie* 'oak-grove' (kverkejo), *jonchaie* 'reed-bed' (junkejo). Very near the Esperanto *-ej* in pronunciation is the Lithunian locative case in such examples as *krantùveje* 'in the shop' (en la vendejo) or *dižeje* 'in the box'.

**-et**

as a diminutive or at least part of a diminutive is found in many Romanic languages and is familiar to the English in such words as *maisonette, briquette.* We form new words with -let on the analogy of *rivulet* or *brooklet,* e. g. *booklet, flatlet.* As in Esperanto French can add *-et* to an adjective e. g. *blondet, maigret.*

**-ig**

may owe its origin to Germanic verbs in *-igen* originally formed from adjectives in *-ig* e. g. *heiligen* 'to sanctify' (sanktigi) and then extended to others e. g. *reinigen,* 'to clean, purify' (purigi), *festigen* 'to consolidate' (firmigi). Dr. ZAMENHOF may well have had in mind also the Latin *-icąre* in *-ificąre* e. g. *magnificąre* (grandigi). The Esperanto double series *-ig/iĝ* is closely paralleled in Finnish with *-ttaa, -ttää* and *utua,* e. g. *vapauttaa* (liberigi) and *vapautua* (liberiĝi).

**-il**

as the suffix to form implements or means is reminiscent of Lat. *utensīle* > Fr. *outil.* However, Dr. ZAMENHOF found a strong reinforcement in the German *-el* (originally *-il*) e. g. *Schlüssel* 'key' (ŝlosilo) *Meissel* 'chisel' (ĉizilo). He was, furthermore, well acquainted with the Russian *pravílo* 'rudder' (direktilo).

**-in**

as a feminizing suffix is familiar to both Romanic and Germanic speakers. There are in the first place the Latin *rēgīna* (reĝino), the international *heroine* (heroino) and a number of personal names like *Wilhelmina, Clementina, Georgina.* The German suffix *-in* is used in addition for the females of animals, e. g. *Löwin* (leonino), *Füchsin* (vulpino) and as *-inne* extends to Dutch and the Scandinavian languages.

**-uj**

is more difficult to account for, but it may have been suggested by French *étui* 'a case', also used in German. For receptacles used to hold food English shows a bewildering variety e. g. salt-

cellar, pepper-pot, sugar-basin, soup-tureen, salad-bowl etc. French has to some extent systematized *-ier/-iere* e. g. *salière, poivrier, sucrier, soupière, saladier.* The use of *-ier* to designate plants, especially trees, may have given Dr. ZAMENHOF the idea of extending *-ujo* in this direction, e. g. *cerisier* (ĉerizujo). Lithuanian has a 'container' suffix *-ine* which it applies like Esperanto *-ujo* to food vessels, e. g. *cukrine* (sukerujo), *druskine* (salujo), *sviestine* (buterujo).

**-ul**

may be the Latin suffix *-ulus* in *credulus, balbulus* (Notker Balbulus 'the Stammerer'), but it has an independent parallel in the use in Rumanian of the postposed definite article *-ul* to form masculine personal substantives out of adjectives of quality, e. g. *voinicul* (kuraĝulo), *bogatul* (riĉulo).

This attempt to discover wider connections of the Esperanto affixes was undertaken before I came across J. BIANCHINI's Latin treatise Cursus Completus Esperanti which ranges even farther afield into cognate or at least not altogether dissimilar phenomena in African and Asiatic languages. The present investigation shows clearly how Esperanto spans the whole continent of Europe from Portuguese to Russian. Intentionally or unintentionally Dr. ZAMENHOF, who knew both East and West, selected his affixes not on the basis of maximum, but rather of 'optimum' internationality. The parallels between Russian and the western languages and, among these, between the Romanic and Germanic languages are a precious asset quite apart from their mnemonic value. Esperanto is in effect cross-bred, and cross-breeds are often characterized by great vigour and powers of resistance.

**Resumo**

La artikolo komenciĝas per aludo al la lingvaj konoj kaj studoj de d-ro ZAMENHOF, rakontante la okazon kiam li ekvidis la gravecon de afiksoj por ŝpari al lernanto la akiron de multaj unuopaj vortoj. Ĝi atentigas al la valoro de la simplaj sufiksoj uzataj por marki la grama-

tikajn vortklasojn, kaj poste turniĝas al la pli specifaj prefiksoj kaj sufiksoj uzataj en la vortfarado. Ĝi montras kiel d-ro ZAMENHOF ĉu intence, ĉu nekonscie elektis afiksojn kiuj havas similaĵojn en pluraj diversaj lingvoj, do faciligas la memoradon de vortoj ĉe multaj popoloj. Pro tiu interligo de okcident- kaj orienteŭropaj lingvoformoj Esperanto estas efektive »optimume« internacia.

## REFERENCES

BIANCHINI, J., 1934: Cursus Completus Esperanti. S. Vito Tagliamento.

KÖKENÝ, L. & BLEIER, V., 1933—34: Enciklopedio de Esperanto. Vol. 2. Budapest.

PRIVAT, EDMOND, 1923: Vivo de Zamenhof. Leipzig.

# Esperantigaj principoj de japanaj vortoj

de N. KAWASAKI*)

Ĝis nun neniu japana vorto fariĝis oficiala en Esperanto. Logike ni povas diri ke, por priskribi la propre japanajn aferojn, uzo de japanaj vortoj estas neevitebla. Kaj, fakte, de japanoj, kaj eĉ de eŭropanoj estis kaj estas uzataj kelkaj japanaj vortoj. OKAMOTO enkondukis en sian verkon Japana-Esperanta Vortaro, 1935, multajn japanajn vortojn kiel Esperantajn. Bedaŭrinde li ne montras, per kiaj principoj de transskribado li tion faris. Tial ĉi-sube mi esprimos mian observon kaj opinion.

## Japana lingvo per latina alfabeto

Ordinare japana lingvo estas skribata per intermikso de ĉinaj ideogramoj kaj japanaj silaboliteroj. Sed progresemuloj, kiuj deziras simpligi la skribadon, alprenas latinajn literojn, t. e. la latiniga movado estas potenca en Japanujo.

Ekzistas du transskribaj sistemoj per latinaj literoj. Unu estas la sistemo laŭ HEPBURN, la alia la registara sistemo. La unua estis elpensata de usonano HEPBURN. Ĝiaj principoj: vokaloj en kontinenta maniero, konsonantoj en angla maniero. Ĝiaj superecoj: pli-malpli da fonetikeco kaj la longa historio de praktika uzado de multaj personoj. La dua estas nenio alia ol »japana sistemo« kun kelkaj malgrandaj modifoj faritaj de la registaro. Ĝiaj principoj: bazitaj sur la nova scienco fonologio (ne fonetiko). Ĝiaj superecoj: Pli multe respondas al la sentoj de japanoj kaj klare montras la gramatikajn strukturojn de la japana lingvo.

Sed kiam japanaj esperantistoj enkondukas japanajn vortojn en Esperanton, ili alprenas nek la unuan sistemon nek la duan, sed ili transskribas la vortojn per la Esperanta sistemo. Ĉar la latinigo de la japana lingvo por ĉiutaga uzo de japanoj kaj la

---

*) profesoro ĉe Kolegio de Lingvoj de Osaka, Japanujo.

esperantigo de japanaj vortoj por Esperanta vortotrezoro estas tute diferencaj aferoj. Vidu la ekzemplojn: »chi« de la unua sistemo, havanta la sonon »ĉi«, aŭ »tu« de la dua sistemo, havanta la sonon »cu«, estus absurdaĵoj en Esperanto.

## Du fontoj de japanaj vortoj

Precize dirite, ekzistas du fontoj de japanaj vortoj ĉe esperantigo. Japanaj vortoj enkondukitaj aŭ enkondukotaj rekte de la nuntempa japana lingvo kaj japanaj vortoj enkondukitaj jam de longe en diversajn eŭropajn lingvojn, ofte kun ortografia kripligo. La duan fonton ni povas klasigi jene:

1. Tute same en Esperanto kaj en japana lingvo:

| eŭr. | jap. | Esp. |
|---|---|---|
| kimono | *kimono* | kimono (vesto) |
| harakiri | *harakiri* | harakiri (sinmortigi per entranĉo en la ventron) |

2. Iom diferencas de japanaj:

| | | |
|---|---|---|
| bonze | *bonzoo* | bonzo (budaisma pastro) |
| daimios | *daimjoo* | daimio (feŭdestro) |
| jinriksha | *ĵinrikiŝa* | ĵinrikŝo (veturilo) |
| soy | *ŝooju* | sojo (saŭco) |

3. Ortografia ŝanĝo en Esperanto:

| | | |
|---|---|---|
| judo | *ĵuudoo* | ĵudo (gimnastika arto) |
| shogun | *ŝoogun* | ŝoguno (ĉefo de feŭdalismo) |

4. Multe modifitaj en Esperanto:

| | | |
|---|---|---|
| katsuwonus | *kacuo* | kacuono (fiŝo) |
| shakdo | *ŝakudoo* | ŝakdoo (metalo) |
| wasabi | *ŭasabi* | vasabio (planto) |

rim.: latine: *Katsuwonus vagans* kaj *Eutrema wasabi*.

La unuan fonton mi detale analizos en la sekvantaj paragrafoj.

## Vortospecoj de japanaj vortoj

La vortospecoj (parolpartoj) de japanaj vortoj enkondukitaj aŭ enkondukotaj estas nur du. La absoluta plimulto estas substantivoj kaj mi trovis nur du verbojn. Unu estas *harakiri*, trovebla en la vortaro de Wüster. Kvankam ĝi estas substantivo en japana lingvo, la verba formo estas tre oportuna en Esperanto. En la vortaro de Okamoto estas juzeni (metodo tinkturi kimonon), kiu estas farita per la japana substantivo juuzen kun aldono de verba finaĵo.

## Forlaso aŭ konservo de finvokalo

Ĉiuj japanaj vortoj finiĝas per iu el la vokaloj *a, e, i, o, u* (povas esti longaj aŭ diftongoj) aŭ *n*. *n* en la fino de la vorto ne estas pura konsonanto, sed vokaleca kaj silaboformanta nazalo, kiu ne plene similas al la angla ng en king. Ĉe esperantigo tiu *n* estas traktata kiel pura konsonanto. Ekz. *ĉirimen* ĉirimeno (ŝtofo).

Kiam fremda vorto fariĝas Esperanta, ordinare oni forlasas la finan vokalon, se ne ekzistas alia kaŭzo, kiu nepre bezonigas tiun vokalon. Japanoj ankaŭ ĝenerale sekvas tiun principon, sed kelkaj, ekz. S-ro Miyazaki, talenta poeto, opinias, ke ĉiuj finaj vokaloj de japanaj vortoj estas ĉiam konservendaj, ĉar per tio la vortoj ne estas kripligitaj kaj estas facile rekoneblaj de japanoj. Ekz. laŭ li *sakura* (ĉerizarbo) estu sakurao kaj ne sakuro. Kiam mi vidis unuafoje en la vortaro de Wüster la vorton cugo (planto), mi ne povis decidi, ĉu ĝi estas el *cuge* aŭ el *cuga*. Post pripenso, ke *cuge* estas bukso, mi rezonis, ke cugo devas esti *cuga*. Ĉi-sube mi analizos la vortojn el la vortaro de Okamoto.

1\. 1 o > o: japana kaj Esperanta same.
Ekz.: *mikado* > mikado.
mikado (imperiestro)
kimigajo (himno de japana imperio)
cubo, hiro (mezurunuoj)
kamiŝimo (vesto de samurajo), kimono

anago (fiŝo)
miso (fabofromaĝo), kamaboko (fiŝgalantino)
kakemono (belarta rulpendaĵo)
rim.: supo el miso ne estu missupo (!?)

1. 2 oo > o: japana longa o kaj Esperanto o.
Ekz.: *ĵuudoo* > ĵudo.
bonzo, daimio
ĵudo
kagero (aera diafana movetaĵo)
kimigajo, ŝintoismo (religio)
inro (pilolujo)

1. 3 oo > oo: japana kaj Esperanta same.
Ekz.: *baŝoo* > baŝoo.
rim.: En la japana lingvo oni elparolas (o:), sed en Esperanto (o'o), kiel du o.
baŝoo (planto)
ŝakdoo
noo (muzika teatraĵo)
goo, ŝoo, ĵoo (mezurunuoj)
rjoo (monunuo)

1. 4 o > oo: *koto* > kotoo (muzika instrumento). Por eviti homonimon pro la jam ekzistanta koto (malpuraĵo) plia o estas aldonata.
*go* > goo (ludo). Ĉar Esperantaj substantivoj devas havi minimume du silabojn, o estas aldonata. Komparu goo (ludo) kun goo (mezurunuo). La unua estas japane *go*, dum la dua estas japane *goo*.

2. 1 a > o: Ekz.: *geiŝa* > gejŝo (kantistino).
gejŝo, jokozuno (supera rango de luktisto)
sairo (fiŝo)
bivo (muzika instrumento)
cugo, kakicubato, miogo, saso, taĉibano (plantoj)

kunepo, makuvo (fruktoj)
kokuro (ŝtofo), hakamo (faldoriĉa pantalono)

2. 2 a > ao: Ekz.: *geta* > getao (lignoŝuo).
getao
utao (poemo), kanao (silabolitero)
kapao (rivera monstro)
ŝimadao (virina harligo)
rim.: getao, kanao, kapao pro la jam ekzistantaj geto, kano, kapo.

3. 1 e > o: Ekz.: *macudake* > macudako.
macudako (pinfungo), ŝiitako (fungo)
amazako (dolĉa glueca sakeo)
ĉonmago (vira harligo)

3. 2 e > eo: Ekz.: *sake* > sakeo.
sakeo (alkoholaĵo el rizo)
ameo (hordea glutenaĵo)
ajameo, umeo (plantoj)
momeo (mezurunuo)
hitatareo (vesto)
hukusukeo (grandkapa pigmeo)
rim.: sakeo ne povas esti sako.
Ĉe ukijoeo (ĝenrobildo) la fina e signifas bildon tial ĝi estas la esenca parto de la vorto kaj ne forlasebla.

4. 1 u > o: Ekz.: *dodoicu* > dodoico.
hajko (poemeto), dodoico (kanteto)
Ebiso (dio de feliĉo)
hanaŝobo, iĉihaco, ŝakujako (plantoj)
sugoroko (ludo), tanzako (oblonga karto)

4. 2 u > uo: Ekz.: *anzu* > anzuo.
anzuo (frukto)
tohuo (faba kazeo)
ŝakuo (mezurunuo)

5. 1 i > o: Ekz.: *haori* > haoro.
haoro (supervesto), eboŝo (kapvesto)
sukijako (bolado de bovaĵo kun legomoj)
ĵoruro (kanto)
Inaro (dio de feliĉo)
tatamo (mato kun matraco)
hiĉiriko, ŝakuhaĉo (muzikaj instrumentoj)

5. 2 i > io: Ekz.: *obi* > obio.
hapio (vesto), obio (zono), tabio (piedvesto)
hiŝio (manĝaĵo), moĉio (pistita rizkuko),
suŝio (manĝaĵo)
ekirio (infana epidemio)
uruŝio (lako).
akebio, ŝio, vasabio (plantoj)
gobaiŝio (gajlo)
noŝio (signo ĉe donacaĵo), ŝikiŝio (karto)
sajorio (fiŝo)
cuzumio (muzika instrumento)
rio (mezurunuo)

6. 1 ai > aj: Ekz.: *samurai* > samurajo.
samurajo (militisto en feŭdalismo)
habutajo (ŝtofo)
utajo (kanto)

6. 2 ei > ej: Ekz.: *Hotei* > Hotejo (dio)

6. 3 ii > ij: Ekz.: *torii* > torijo (pordego de ŝintoisma sanktejo)

## Ortografio

1. Ĉe japanaj vokaloj oni severe distingas longecon de mallongeco.
Ekz.: *koto* (muzika instrumento)
*kootoo* (altgrada)
*kooto* (virina supervesto)
*kotoo* (izolita insulo)

Sed ĉe esperantigo tia distingo estas ignorebla, ĉar tre malmultaj vortoj estas enkondukindaj, kaj en Esperanto tia distingo ne estas kutima.

Ekz.: *toohu* > tohuo, *ĵooruri* > ĵoruro
*juuzen* > juzeni, *ĵuudoo* > ĵudo

rim.: Ĉe la fino de vorto oni iafoje konservas longecon (vidu: 1. 3)

rim.: Kelkaj japanoj volas ĉiam konservi vokallongecon,

ekz.: S-ro Tooguu en sia traduko Deklaracio: zoonio (supo kun moĉio) < *zooni*.

2. La vortfinan »n« ni jam pritraktis. En japana lingvo »n« antaŭ »m, b, p« estas elparolata »m«. Tial se oni volas enkonduki *tenpura* (manĝaĵo), ĝi devas esti tempuro. Sed s-ro Okamoto skribas ĉonmago, ĝi ne estas fonetismo, sed grafismo (vidu supre sub 3. 1 e > o: ĉomago estas neebla, ĝi povas signifi »virina harligo papiliforma«).

   Ekzemploj de vortfina n.
   ĵankeno
   ronino, ŝoguno
   sorobano (kalkulilo)
   suno, keno (mezurunuoj)
   eno, seno, rino (monunuoj)
   kano, kino (pezunuoj)
   jokano (fazeola ĵeleo), mirino (alkoholaĵo)
   ĉirimeno
   ŝamiseno

3. Japana lingvo havas multe da duoblaj konsonantoj, ekz.: mm, nn, tt, kk, ss, ĉĉ ktp. Ĉe esperantigo oni simpligas ilin en unu.

   Ekz.: *momme* > momeo
   *happi* > hapio
   *kappa* > kapao

4. Palatigitaj konsonantoj estas tre multaj, ekz.: kja, mja, rja, ktp.

Ĉe esperantigo ekz.:

*mjooga* > miogo (latine: *Zingiber mioga),*
*daimjoo* > daimio. Sed vidu: rjoo < *rjoo.*

rim.: *Tookjoo* > Tokio. Nepre akcentu la antaŭlastan i. Estas adjektiva formo: Tokiaj samideanoj. Pri la elparolo de Tokio s-ro ROLLET DE L'ISLE eraris en sia traktato pri propraj nomoj.

5. Du sinsekvaj vokaloj interne de la vorto ofte fariĝas diftongoj en Esperanto, ekz.: *haiku* > hajko, *geiŝa* > gejŝo.
   Sed estas formo daimio, kvankam kelkaj, ekz.: s-ro OSSAKA, preferas dajmio.

6. ŭ > v.
   Ekz.: *biŭa* > bivo, *ŭasabi* > vasabio, *makuŭa* > makuvo.

7. pri »fu«. En Hepburn-sistemo oni uzas »fu«, sed la korekta elparolo ne estas dentolipa sono, tial s-ro OKAMOTO skribas tohuo, ne tofuo.

8. pri »je«. Tia silabo ne ekzistas en japana lingvo. En kelkaj eŭropaj lingvoj oni skribas ukiyoye, yen. Ni japanoj preferas ukijoeo, eno.

*Postskribo.* Plenan liston de japanaj vortoj enkondukitaj kaj enkondukotaj mi baldaŭ publikigos. Tiam mi aldonos al ĝi detalan klarigon pri la signifoj, se eble, eĉ kun bildoj.

**Résumé.**

Principes d'espérantisation des mots japonais.

Tous les mots japonais finissent en voyelles (a, e, i, o, u) ou en n. Quelquefois on conserve la voyelle, ex.: mikado < *mikado* (empereur). Quelquefois on la change: gejŝo < *geiŝa* (chanteuse-courtisane). Rem.: On ne peut pas accepter koto < *koto* (instrument musical) à cause de koto (boue), donc la forme doit être kotoo. En japonais on distingue rigoureusement la quantité des voyelles, mais en espérantisant on supprime la différence. Ex.: ĵudo < *ĵuudoo* (art gymnastique). Mais voyez: baŝoo < *baŝoo* (planto). Les con-

sonnes géminées, qui sont si fréquentes en japonais, deviennent simples en Espéranto. Ex.: hapio < *happi* (une espèce d'habit).

## BIBLIOGRAFIO

OKAMOTO, J., 1935: Nova vortaro japana-Esperanta.

TOOGUU, T., 1924: Deklaracio (traduko de la novelo de ARIŜIMA, T.). Leipzig.

ROLLET DE L'ISLE, 1935: Skribado kaj prononcado de personaj kaj lokaj nomoj. Paris.

OSSAKA, K., 1921: Perloj el la Oriento. Tokio.

WÜSTER, EUGEN, 1923: Enciklopedia vortaro Esperanta-germana. Leipzig.

# Ĝemelaj radikoj

de D-ro F. I. WIENER*)

En la sekvontaj paragrafoj mi intencas priparoli grupojn da vortoj, la plejmulto fundamentaj kaj bone konataj de ĉiu esperantisto, kiujn ZAMENHOF formis el la samaj radikoj aŭ el malsamaj stadioj atingitaj per ĉi tiuj radikoj en ilia evoluo. Plej ofte unu el la vortoj de la grupoj havas sian latinan formon, la alia aŭ la aliaj la formon, kiun la latina vorto alprenis en moderna lingvo (franca, angla, germana aŭ itala). Nur en malmultaj okazoj ni trovos arbitre inventitajn formojn. La plejmulto de la grupoj enhavas du vortojn, pro kio mi parolas pri »ĝemelaj radikoj«, sed ekzistas ankaŭ »tri- kaj kvarnaskitaj«. La leganto trovos ilin sub numero III.

La intenco de ZAMENHOF estis kompreneble diferencigi inter la nuancoj de signifo kaj doni al ĉiu Esperanta vorto nur unu signifon. Ni nun scias per la sperto, ke la principo de unusignifaj vortoj ne povas esti efektivigata sen nefina multigo de la radikoj. Eble en la unuaj Esperantaj tekstoj kun iliaj simplaj enhavoj la ideo estis plenumebla, sed unu rigardo en »Plenan Vortaron« montras al ni, ke la kreskado de la Esperanta literaturo multigis la signifojn de la ekzistantaj vortoj. La principo de ZAMENHOF estas iomete ŝanĝita, kaj ni povas diri, ke la nuna tendenco estas doni al ĉiu vorto laŭeble malmultajn signifojn kaj difini ilin precize. ZAMENHOF iris alian vojon: li esprimis nuancojn de signifo per malsamaj sed similaj vortoj. Nu, la esperantistoj, kiuj efektive uzas la lingvon, scias, ke ne estas ĉiam facile teni ĉi tiujn vortojn aparte kaj eviti konfuzojn. Reformemuloj ofte mallaŭdas ilin kaj volas anstataŭigi ilin per vortoj kun pli granda malsameco aŭ unuigi plurajn signifojn en la sama vorto, kiel okazas en naciaj lingvoj. La kritiko estas iomete komprenebla, sed nun estas tro malfrue por ŝanĝo.

---

*) Master of Arts (magistro), licenciato de Brit. Esp. Asocio, instruisto (tutor) en la germana fako ĉe la Universitato de Liverpool.

La listo ne estas kompleta; mi nur mencias grupojn, kiujn mi hazarde trovis dum ses monatoj, sed mi opinias, ke la plej gravaj kaj la plej interesaj ekzemploj estas inter ili. Mi invitas la legantojn serĉi aliajn kaj informi min pri novaj trovoj, por ke ili povu esti enmetataj en postan liston.

Kvankam ŝajnas iomete superflue, mi rimarkas, ke temas ĉi tie ne pri vortoj farataj kun la helpo de afiksoj, sed nur pri radikoj. Ili povas alpreni la gramatikajn finaĵojn o, a, i kaj e, kiujn la leganto bonvolu aldoni laŭbezone. Plue mi ne priparolas sciencajn kaj teknikajn fakterminojn, kiuj liverus grandan amason da »ĝemeloj«, ĉar tiaj esprimoj estas ofte prenataj el modernaj lingvoj pro ilia internacieco, kvankam aliformaj Esperantaj radikoj ekzistas.

Mi konscias, ke la divido de la listo en tri partojn (el kiuj unu estas subdividita per a. kaj b.) fariĝis nur pro eksteraj kialoj. De la scienca vidpunkto ne ekzistas specifa diferenco inter la tri partoj; sed mi provis starigi iun sistemon kaj montri la variecon de la formadoj.

Por ŝpari spacon mi aldonas la signifojn de la Esperantaj vortoj anglalingve en krampoj post la radikoj.

I.

En sia evoluo la latina radiko ŝanĝiĝis tiom, ke la franca aŭ angla vortoj rezultantaj el ĝi montras formojn, kiuj ne plu estas tre similaj al la originalo; tial la danĝero de konfuzo ne estas granda. La unuaj tri ekzemploj bone montras la karakterizan diferencon aluditan en la komenco (latina kaj modernlingva vortoj).

a) *katen* (fetter) — b) *ĉen* (chain).

La latina vorto 'catena' havis ambaŭ signifojn; ĝi evoluis en la francan 'chaine' kaj anglan 'chain', kiuj ambaŭ povas esti uzataj en la konkreta kaj la abstrakta (figura) sencoj.

a) *lingv* (language) — b) *lang* (tongue).

La latina vorto 'lingua' havis ambaŭ signifojn, same la franca 'langue', kiu evoluis el ĝi. La angla kaj la germana vortoj havantaj la signifon b) (tongue, Zunge) estas ofte uzataj por a).

a) *numer* (number, 'no') — b) *nombr* (number, quantity).

La latina 'numerus' evoluigis la francan 'nombre', sed la franca kaj aliaj modernaj lingvoj (ekz. la germana) ankoraŭ uzas la latinan ablativon ('numero', kelkfoje difinita kiel la itala vorto) en la senco a). Tio estas okazo de »ĝemelaj radikoj« en naciaj lingvoj. La germana lingvo eĉ evoluigis du vortojn kun la senco a): 'Numero', kiu estas ofte uzata fremda vorto, kaj 'Nummer', ĝian germanigitan formon.

a) *vel* (sail) — b) *vual* (veil).

La latina 'velum' havis ambaŭ signifojn, sed en la senco a) estis kutime uzata en la multnombro, do 'vela', kiu estis miskomprenata kiel ina ununombro kaj evoluis en francan '*la* voile', dum 'velum' (b) estiĝis '*le* voile'. Tiel la franca lingvo ankoraŭ uzas la saman vorton por la du signifoj, sed kun malsama genro.

a) *pund* (pound, £) — b) *funt* (pound, lb).

La latina fonto estas la ablativo 'pondo' (en pezo, pezanta). La angla kaj la germana ('Pfund') lingvoj uzas la samajn vortojn respektive por ambaŭ signifoj; 'pund' estas alsimiligita al la angla, 'funt' al la germana prononcoj. Pasante mi rimarkigas, ke ankaŭ la franca lingvo uzas la saman esprimon por ambaŭ signifoj ('la livre'). La ekspliko estas kompreneble, ke en pli fruaj tempoj la valoro de mono estis indikata laŭ ĝia pezo. — El la latina vorto 'libra' la itala lingvo evoluigis ĝemelajn radikojn: a) lira — b) libbra.

### II a.

La diferenco konsistas en unu litero.

a) *agord* (to tune) — b) *akord* (harmonise).

La latina vorto 'cor, cordis' (koro) estas la ĉefa fonto de la radikoj. Notu, ke a) estas transitiva kaj b) intransitiva. La diferencigo estas arbitra kaj nenecesa, ĉar 'akordigi' povas esti uzata en la senco a); komparu la »Edinburgh« vortaron, kiu tradukas 'akordigi' per 'to tune'.

a) *cend* (cent, coin) — b) *cent* (100).

Latine 'centum'; la diferencigo estas arbitra. Komparu:

a) cigaredo (cigarette) — cigareto (cheroot).

a) *front* (front) — b) *frunt* (forehead).

Arbitra diferencigo de la sama vorto (latine frons, frontis). La angla kaj la germana lingvoj uzas aliajn vortojn por b) (forehead, Stirn), sed la franca ne diferencigas (front).

a) *general* (general, mil.) — b) *ĝeneral* (general, common).

La latina vorto 'generalis' signifis 'rilatanta al ĉiuj'. Por diferencigi kaj por povi uzi la vorton en la senco b), kiun ĝi havas en la plej multaj naciaj lingvoj, Zamenhof ŝanĝis unu literon, ne arbitre en ĉi tiu okazo, ĉar la prononco 'ĝeneral' ekzistis jam en la angla kaj itala lingvoj. La konsekvenco estas la sama kiel en 'pund-funt': b) estas alsimiligita al la angla, a) al la germana prononcoj.

a) *jak* (jacket) — b) *ĵak* (frock-coat).

La signifoj estas tiuj de franca a) jaque(t) — b) jaquette. La rezulto estas en a) alsimiligo al la germana prononco ('Jacke'), en b) al la franca prononco; kp. pund-funt. — La francaj vortoj verŝajne devenas de la nomo 'Jacques' (Jakobo).

a) *jur* (law, science of law) — b) *ĵur* (oath).

Latine 'jus, juris' (leĝo) kaj la verbo 'jurare' (ĵuri) estas la fontoj. Pri la prononcoj komparu 'jak-ĵak'.

a) *kart* (card) — b) *ĉart* (a charter).

La latina 'charta' (papiruso, papero kaj 'kio estas skribita sur papero') estas la fonto. Rilate al la prononco komparu la francajn ĝemelojn 'carte — charte' kaj precipe la anglajn ekvivalentojn. En la modernaj lingvoj 'papyrus' estas la kutima fonto de vortoj signifantaj 'papero', dum la vortoj devenigitaj de 'charta' signifas 'kartono' kaj 'kio estas skribita aŭ desegnita sur kartono'. Komparu:

a) *karton* (cardboard) — b) *kartun* (v. Fulcher & Long sub 'Neologisms', cartoon).

a) *kompromit* (compromise, endanger, commit oneself) — b) *kompromis* (compromise, arrange).

En la latina lingvo la verbo 'compromittere' kaj la substantivo 'compromissus' havis la respektivajn signifojn 'promesi (aŭ promeso) toleri la juĝon de decidonto', kiu iomete respondas al b). En la senco a) 'compromittere' estas postklasika miksaĵo de 'committere' (fari justecon) kaj 'promittere' (teni antaŭen, montri). En la franca, germana kaj angla lingvoj nur la verbo

havas ambaŭ sencojn kaj la substantivo nur la signifon b). Esperanto uzas la t-radikon, kiu respondas al la latina, franca kaj germana verboj, nur en la senco a), verbe kaj substantive, kaj la s-radikon en la senco de la nacilingva substantivo, kompreneble ankaŭ verbe kaj substantive.

a) *koncern* (concern, interest) — b) *konzern* (concern, trust).

b) troviĝas en Plena Vortaro, sed povas esti ignorata ĉi tie kiel faka termino. Arbitra diferencigo, eble kaŭzita per la germana literado. Komparu:

a) *interes* (interest, general) — b) *interez* (interest, percentage). b) troviĝas en Plena Vortaro krom 'procento', FULCHER & LONG kaj la »Edinburgh« vortaro havas nur la lastan.

a) *kramp* (clamp) — b) *krampf*, Plena Vortaro: *kram(p)f* (spasm).

France 'crampe' havas la sencon b), dum en la senco a) 'crampon' estas uzata. La fonto ŝajnas esti kelta. La germana lingvo evoluigis ĝemelajn radikojn a) Krampe (malaltgermana formo) — b) Krampf (altgermana), kiuj estiĝis la modeloj de la Esperantaj vortoj. La kuntiriga efiko estas la komuna elemento en la du signifoj.

a) *liter* (letter of alphabet) — b) *leter* (letter, epistle).

Latine a) littera — b) litterae (multnombro de a)). La diferencigo okazas nek en la franca (lettre) nek en la angla lingvoj.

a) *nep* (grandson) — b) *nev* (nephew).

Latine 'nepos', kiu origine signifis 'nepo', alprenis ankaŭ la signifon 'nevo' en post-Aŭgusta tempo. Ĝuste ĉi tiu malfrua signifo estis sola retenata en la franca, germana kaj angla lingvoj (fr.: neveu, germ.: Neffe; ekzemplo de diferencigo en naciaj lingvoj).

| 9 | *gaj-* | 14 | 26 |
| | — (a) | | 12 |
| 8 | *gard-* | 11 | 19 |
| | (R) — S | | 11 |
| 7 | *gast-* | 11 | 18 |
| | — (o) | | 10 |
| 3 | *gazet-* | 5 | 22 |
| | — (o) | | 20 |
| | — oj | | 11 |
| 15 | *ge-* | 17 | 37 |
| | — / o | 11 | 26 |
| | — R oj | | 18 |
| | — R Sx | 7 | 14 |
| 4 | *german-* | 8 | 59 |
| | — (o) | | 12 |
| | — (a) | | 33 |
| | — a | | 22 |
| | — ujo | | 13 |
| 6 | *glit-* | 8 | 11 |
| 6 | *glor-* | 10 | 19 |
| 19 | *grand-* | 28 | 163 |
| | — (a) | | 105 |
| | — a | | 59 |
| | — an | | 23 |
| | — aj | | 14 |
| | — S | | 13 |
| | mal — . | | 31 |

| Paradigmoj | | Vortoj | Klišoj |
|---|---|---|---|
| | mal — (a) | | 27 |
| | (Pe) — S | | 22 |
| 4 | *grav-* | 8 | 39 |
| | — (a) | | 32 |
| | — a | | 16 |
| 6 | *grup-* | 9 | 23 |
| | — (o) | | 18 |
| | — oj | | 10 |
| 9 | *gvid-* | 16 | 28 |
| | — (i) | | 13 |
| 5 | *ĝarden-* | 8 | 28 |
| | — (o) | | 21 |
| | — o | | 13 |
| 1 | *ĝeneral-* | 4 | 26 |
| | — (a) | | 26 |
| | — a | | 13 |
| 2 | *ĝi* | 6 | 355 |
| | — | | 193 |
| | — (a) | | 45 |
| | — a | | 23 |
| | — aj | | 12 |
| | — n | | 117 |
| 2 | *ĝis* | 2 | 73 |
| | — | | 71 |
| 17 | *ĝoj-* | 29 | 65 |
| | — (i) | | 11 |
| | — (o) | | 15 |
| | — o | | 13 |
| | mal — . | | 19 |
| 3 | *ĝust-* | 7 | 27 |
| | — (a) | | 25 |
| | — e | | 15 |
| 1 | *ha* | 1 | 16 |
| 6 | *halt-* | 10 | 16 |
| 10 | *har-* | 12 | 25 |
| | — (o) | | 12 |
| 17 | *hav-* | 29 | 163 |
| | — (i) | | 127 |
| | — as | | 83 |
| | — is | | 30 |
| | Pe — (i) | | 15 |
| | en — . | | 21 |
| | en — (i) | | 13 |
| | (Pe) — S | | 13 |
| 5 | *hejm-* | 8 | 21 |
| | — (e) (R) | | 10 |
| 9 | *hel-* | 14 | 23 |
| | mal — . | | 14 |
| | mal — (a) | | 11 |
| 14 | *help-* | 27 | 61 |
| | — (i) | | 12 |
| | — (o) | | 13 |
| | mal — . | | 18 |
| | mal — (i) | | 10 |
| 5 | *histori-* | 9 | 15 |
| | (R) — (o) | | 11 |
| 1 | *ho* | 1 | 63 |
| 2 | *hodiaŭ* | 2 | 22 |
| | — | | 21 |
| 11 | *hom-* | 20 | 134 |
| | — (o) | | 87 |
| | — o | | 41 |
| | — oj | | 35 |
| | — (a) | | 15 |
| | — ar . | | 25 |
| | — — (o) | | 20 |
| | — — o | | 17 |
| 9 | *honor-* | 15 | 28 |
| 6 | *hont-* | 10 | 11 |
| 2 | *hor-* | 5 | 23 |
| | — (o) | | 22 |
| | — o | | 13 |

| Paradigmoj | | Vortoj | Klišoj |
|---|---|---|---|
| 7 | *humil-* | 10 | 11 |
| 832 | E/(*i*)*) | 2366 | 6990 |
| | i/(i) | 1659 | 6045 |
| | aĉeti . | | 10 |
| | ag . | | 10 |
| | akcept . | | 25 |
| | akir . | | 16 |
| | am . | | 27 |
| | aparten . | | 10 |
| | aper . | | 27 |
| | (Pf) — . | | 37 |
| | atend . | | 28 |
| | ating . | | 17 |
| | aŭd . | | 32 |
| | aŭskult . | | 19 |
| | (E) bat . | | 10 |
| | bezon . | | 13 |
| | (E) bril . | | 10 |
| | dank . | | 11 |
| | demand . | | 42 |
| | dev . | | 106 |
| | dezir . | | 23 |
| | dir . | | 202 |
| | (Ppe) — . | | 17 |
| | don . | | 57 |
| | Pp — . | | 38 |
| | al — . | | 14 |
| | el — . | | 14 |
| | trans — . | | 10 |
| | dorm . | | 12 |
| | ekzist . | | 26 |
| | esper . | | 18 |
| | esprim . | | 13 |
| | est . | | 1097 |
| | evit . | | 10 |
| | fal . | | 12 |
| | (Ppe) — . | | 17 |
| | far . | | 80 |
| | malferm . | | 17 |
| | fond . | | 11 |
| | forges . | | 21 |
| | gvid . | | 13 |
| | ĝoj . | | 11 |
| | hav . | | 127 |
| | Pe — . | | 15 |
| | en — . | | 13 |
| | help . | | 12 |
| | mal — . | | 10 |
| | ir . | | 52 |
| | Pp — . | | 39 |
| | el — . | | 21 |
| | en — . | | 14 |
| | eV — . | | 22 |
| | ĵet . | | 18 |
| | kant . | | 17 |
| | kaŝ . | | 13 |
| | klopod . | | 13 |
| | komenc . | | 31 |
| | kompren . | | 26 |
| | kon . | | 26 |
| | (Pe) — . | | 33 |
| | (Ppe) konduk . | | 15 |
| | konsent . | | 11 |
| | konserv . | | 11 |
| | (Pf)kovr . | | 11 |
| | kre . | | 13 |
| | kred . | | 18 |
| | kresk . | | 11 |
| | kri . | | 13 |
| | (Pf) — . | | 33 |
| | ek — . | | 20 |

*) (*i*) = -as, -is, -os, -us, -u, -i.

| Paradigmoj | Vortoj | Klišoj | Paradigmoj | Vortoj | Klišoj |
|---|---|---|---|---|---|
| | (Ppe)kur . | 19 | | (Pfp) prem . | 15 |
| | Ppe — . | 11 | | pren . | 23 |
| | kuŝ . | 16 | | Pp — . | 10 |
| | labor . | 18 | | prezent . | 10 |
| | las . | 27 | | propon . | 11 |
| | Ppe — | 24 | | rakont . | 19 |
| | for — . | 18 | | renkont . | 13 |
| | leg . | 12 | | respond . | 44 |
| | lern . | 12 | | rest . | 43 |
| | lev . | 19 | | ricev . | 26 |
| | lud . | 16 | | rigard . | 58 |
| | lum . | 10 | | Pfp — . | 18 |
| | (Ppe) manĝ . | 13 | | rimark . | 11 |
| | met . | 24 | | salut . | 10 |
| | Ppe — . | 16 | | sci . | 81 |
| | montr . | 26 | | sekv . | 12 |
| | (Pfp) — . | 30 | | send . | 10 |
| | mort . | 18 | | (Pe) — . | 18 |
| | okaz . | 24 | | sent . | 34 |
| | opini . | 16 | | serĉ . | 11 |
| | ordon . | 11 | | serv . | 10 |
| | pag . | 10 | | sid . | 16 |
| | parol . | 60 | | (Pf) silent . | 10 |
| | Pp — . | 11 | | skrib . | 13 |
| | pas . | 12 | | (Pp) — . | 21 |
| | Pe pas . | 10 | | (Ppe) son . | 10 |
| | (Pp) paŝ . | 10 | | star . | 34 |
| | (Pp) pend . | 11 | | (Pfp) — . | 44 |
| | pens . | 48 | | sufer . | 10 |
| | perg . | 11 | | (Pf) ŝat . | 12 |
| | permes . | 14 | | ten . | 18 |
| | pet . | 31 | | Pp — . | 14 |
| | port . | 13 | | (Pfp) — . | 35 |
| | Ppe — . | 22 | | tim . | 16 |
| | al — . | 12 | | (Pf) — . | 21 |
| | pov . | 236 | | E tir . | 11 |

| Paradigmoj | Vortoj | Klišoj |
|---|---|---|
| trem . | | 14 |
| trink . | | 11 |
| trov . | | 53 |
| (Pfp) — . | | 61 |
| turn . | | 12 |
| tuŝ . | | 15 |
| uz . | | 13 |
| ven . | | 77 |
| Pp — . | | 29 |
| al — . | | 13 |
| (Pf) — . | | 19 |
| vetur . | | 10 |
| (Pe) — . | | 17 |
| vid . | | 111 |
| Ppe . | | 13 |
| viv . | | 38 |
| Pp vok . | | 13 |
| al — . | | 10 |
| vol . | | 81 |
| Si/(i) | 550 | 701 |
| daŭrig . | | 18 |
| fariĝ . | | 49 |
| klarig . | | 14 |
| leviĝ . | | 20 |
| naskiĝ . | | 12 |
| sidiĝ . | | 11 |
| troviĝ . | | 23 |
| venig . | | 10 |
| Sx/(i) | 36 | 55 |
| ridet . | | 14 |
| a/(i) | 37 | 65 |
| rapid . | | 10 |
| simil . | | 10 |
| sufiĉ . | | 12 |
| o/(i) | 76 | 110 |
| nom . | | 15 |

| | Paradigmoj | Vortoj | Klišoj |
|---|---|---|---|
| | *-i**) | 471 | 1003 |
| | i/ — | 344 | 831 |
| | akcept — | | 10 |
| | dir — | | 20 |
| | don — | | 13 |
| | est — | | 69 |
| | far — | | 24 |
| | parol — | | 15 |
| | vid — | | 17 |
| | Si/— | 105 | 143 |
| | o/ — | 12 | 15 |
| 2 | *ia* | 3 | 33 |
| | — | | 21 |
| 3 | *iam* | 3 | 22 |
| | — | | 20 |
| 9 | *-id-* | 11 | 13 |
| 6 | *ide* — | 13 | 43 |
| | — (o) | | 27 |
| | — o | | 14 |
| | sam — an . | | 11 |
| 4 | *ideal-* | 5 | 10 |
| 85 | *-ig-* | 417 | 549 |
| | / — E | 413 | 544 |
| | / — (i) | 236 | 333 |
| | / — (a) | 31 | 39 |
| | / — Sa | 79 | 88 |
| | / — (o) | 54 | 67 |
| | i / — | 186 | 262 |
| | daŭr — . | | 23 |
| | — — (i) | | 18 |
| | — — is | | 15 |
| | dev — . | | 19 |
| | — — (a) | | 11 |

---

*) vidu E/(*i*).

**[daŭrigota]**

# Bibliografio de esperantologia literaturo 1940-1948

de D-ro Paul Neergaard

II

## E—1. Ortografio (daŭrigita)

Graversen, C.: Interpunkcio en Esperanto. — Dansk Esp.-Blad 16 (n-ro 4) : 28—29, 1944.

Moth, Poul: Forigi la senutilan alpendaĵon! — Arbetar Esperantisten 25 (n-ro 3): 6, 1945.

## E—2. Parolpartoj (partes orationis) (daŭrigita)

### E-22. Substantivoj

Kviz [la vortradiko]? — La Rondo 7 (n-ro 18): 144, 1948.

### E-25. Verboj

Kay, Alex: Radika transitiveco. — Lit. Mondo 3. periodo, 1 (n-ro 3—4): 58—59, 1947.

Kalocsay, K.: Respondo [al P. Nylén]. — Lit. Mondo 3. periodo, 1 (n-ro 11—12): 186—187, 1947.

Kalocsay, K.: Ankoraŭ pri radika transitiveco [respondo al P. Nylén]. — Lit. Mondo 1. periodo, 2 (n-ro 3—4): 58—59, 1948.

Nylén, Paul: »Radika transitiveco«. — Lit. Mondo 3. periodo, 1 (n-ro 11—12): 185, 1947.

Nylén, Paul: Ankoraŭ pri radika transitiveco. — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 3—4): 58, 1948.

Szilagyi, F.: Lingva promenado — supren sur la deklivo. — Arbetar Esperantisten 24 (n-ro 3): 6—7, 1945.

### E-283.2. Interjekcioj (daŭrigita)

Neergaard, Paul: Esprimo de miro kaj malŝato per blasfemaĵoj kaj vulgaraĵoj en Esperanto. — Dansk Esp.-Tidende 3 (n-ro 11—12): 140—141, 1944. — [kaj en]: Kompreni 3 (n-ro 18): 5, 1948.

Szilagyi, F.: El la mondo de la vortoj — la sonimitaj vortoj. — Svenska Esp.-Tidn. 31 (n-ro 10, erare presite: 8): 68—69, 1943.

## E—3. Leksikologio (daŭrigita)

Bailey, William: Corrections to the Millidge Dictionary. — Brit. Esp. 34 (457—458): 30, 1943.

**E-311. Geografiaj nomoj** (daŭrigita)

[JUNG, TEO]: La landnomoj. — Heroldo de Esp. 23 (n-ro 1062): 4, 1947.

KALOCSAY, K.: Pri io-ujo. — Lit. Mondo 3. periodo, 1 (n-ro 5—6) 91—92, 1947.

KALOCSAY, K.: Ankoraŭ pri io-ujo. — Lit. Mondo 3. periodo, 1 (n-ro 9—10): 155—158, 1947.

KALOCSAY, K.: [noto okaze de »nefermita letero al s-ro M. C. Butler« de G. Waringhien]. — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 9—10): 154, 1948.

KOIVU, HANNES & ANTTI RASKU: Pri landnomoj. — Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 4): 29, 1944.

LONG, BERNHARD: Angla alparolo al la »suoma« problemo. — Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 7—8): 52—53, 1944.

NYGÅRD, G. A.: Svedio aŭ Svedujo? — Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 1): 5, 1944.

NYLÉN, PAUL: Io-ujo. — Lit. Mondo 3. periodo, 1 (n-ro 11—12): 185—186, 1947.

RASMUSSEN, H. V.: Geografiaj nomoj en Danlando. — Dansk Esp.-Tidende 4 (n-ro 1—2): 10—11, 1942.

SZILAGYI, F.: Suomujo? — Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 1): 5, 1944.

THEVENIN, L.: Ĉu »ujo«? Ĉu »io«? — Kompreni 3 (n-ro 20): 7, 1948.

THEVENIN, L., M. C. BUTLER kaj M. BUCHET: [notoj pri] io? ujo? — Kompreni 3 (n-ro 23): 7, 1948.

WARINGHIEN, G.: Nefermita letero al s-ro M. C. Butler. — Lit. Mondo 3. periodo, 2 (n-ro 7—8): 122—124, (n-ro 9—10): 152—154, 1948.

WILLS, J. C.: Pri la vorto Usono. — Kompreni 2 (n-ro 16): 6, 1947 (represo el Lingvo Internacia 1907).

VILKKI, JOEL: Suomujo anstataŭ Finnlando! — Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 2): 11—12, 1944.

**E-312. Plantnomoj. Bestnomoj** (vidu 316.4)

**E-316.3. Fremdvortoj. Pruntvortoj**

OLSSON, E.: Scienca vorto pruntita el Esperanto (pri »sama«-stato). — Svenska Esp.-Tidn. 30 (n-ro 3): 20—21, 1942.

SZILAGYI, F.: De Ido ĝis la dancanta pluralo. — Esperantobladet 3. periodo 13: (n-ro 1) 4—5, (n-ro 2) 14, 1946.

**E-316.4. Fakaj vortoj. Teknikaj vortoj**

H. J. [JAKOB, HANS]: La fakvortaro. — Esp. 41 (n-ro 509): 37—38, 1948.

SALEX: Krei fakterminarojn aŭ malprogresi. — Svenska Esp.-Tidn. 34 (n-ro 11): 103—104, 1946.

La fakterminaro. — Scienca Rondo 1 (n-ro 1—2): 13—14, (n-ro 3—4): 36—37, 1948.

*31. Statistiko*

Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística: Termos Estatísticos em Esperanto. Rio de Janeiro 1947. 6 p.

*34. Juro*

E. A. H.: La fakvortaroj [pri leĝaj terminoj]. — Esperantobladet 3. periodo 14 (n-ro 9): 69—70, 1947.

MILDWURF, A.: Leĝa terminaro. — Jarlibro Int. Esp.-Ligo 1946, dua parto: 44—51, 1946.

*38. Komerco. Trafiko*

CHICOT: Pri pezo kaj volumeno rilate al ŝipoj. — La Interligilo 20 (n-ro 211): 63—64, 1948.

*54. Kemio*

DELLIAN, CURT: Racia kaj internacia kemia nomenklaturo (kritikaj studoj pri la sistematiko kaj logiko de la kemia nomenklaturo). Inĝ. Sekcio, Esp-Centro, München 194? 36 p. [recenzo en: Esp. 41 (n-ro 515): 113, 1948].

*58. Botaniko*

NEERGAARD, PAUL: Elementa mikologia terminaro esperanta-latina-dana-germana kun difinoj en Esperanto. La plej gravaj fungosciencaj esprimoj kaj fungaj nomoj. — Dansk Esp.-Tidende 4 (n-ro 1—2): 2—5, (n-ro 3—4): 29—34, 1943.

NEERGAARD, PAUL: Terminologia listo. Plantpatologiaj kaj mikologiaj vortradikoj ne enhavataj en Plena Vortaro (2a eldono, Parizo 1934), kun anglaj ekvivalentaĵoj kaj kun difinoj en Esperanto. — General Index of 1.—10. Ann. Rep. Phytopath. Lab. J. E. Ohlsens Enke: 20—21, 1945.

*59. Zoologio*

ENGHOLM, STELLAN: Evoluo de insektoj. — Svenska Esp.-Tidn. 31 (n-ro 10): 76, 1943.

SZILAGYI, F.: Evoluo de insektoj. — Svenska Esp.-Tidn. 31 (n-ro 11): 70 (novembro) 1943.

*62. Tekniko. Inĝenierarto*

DURRANT, E. D.: Aeronaŭtika terminaro. — Jarlibro Int. Esp.-Ligo 1941, dua parto: 17—52, 1941.

DURRANT, E. D.: Armea terminaro. — Jarlibro Int. Esp.-Ligo 1941, dua parto: 21—47, 1940.

DURRANT, E. D. & FRED. TURNER: Aeronaŭtika terminaro (sveda-esperanta). Stockholm 1948. 4 p. (laŭ SOLZBACHER 1949).

FILLIATRE, ROBERT: Teknologio [diskuto pri teknikaj terminoj]. — La Interligilo 18 (n-ro 5—6): 55, (n-ro 9—10): 8—9, 1946; 19 (n-ro 5—6): 47, (n-ro 9—12): 70, 1947.

ISBRUCKER, J. R. G.: Zakenregister [paralellistoj de elektroteknikaj terminoj en nederlanda, angla kaj Esperanto]. [en] ISBRUCKER: Zwakstroomtechniek, Leerboek der electrotechniek, deel VI: 270—293, 1948.

VENTURE, A.: Radio-terminaro. Int. Esp. Ligo, Rickmansworth 1943. 34 p.

Benamingen op het Gebied der Verlichtingskunde (nederlanda-germana-angla-franca-esperanta, kun indekso por ĉiu lingvo). Arnhem 1941. 154 p. (laŭ SOLZBACHER 1949).

*64. Hejma mastrumado*

VERDA, MYRTLE & VILĈJO: Kudra kaj trika terminaro. — Jarlibro Int. Int. Esp.-Ligo 1947, dua parto: 45—63, 1947.

*65. Komerca kaj trafika tekniko*

SCOTT, HERBERT M.: Filatela terminaro, Esperanta-angla-franca-germana kun difinoj en Esperanto. — Jarlibro Int. Esp.-Ligo 1945, dua parto: 35—60, 1945.

*78. Muziko*

BUTLER, M. C. & F. MERRICK: Muzika terminaro. 35 p. Int. Esp.-Ligo, Rickmansworth 1944.

DOLINSKY, J. V.: Pri muzika terminaro [pri Butler & Merrick: Muzika terminaro] — Esp. Slovaka 3 (n-ro 7—8): 124—125, 1948.

*79. Distrado. Ludo. Sporto*

Komitato de S. B. E. T.: Terminaro por infanludoj. 28 p. — Int. Esp.-Ligo, Rickmansworth 1942.

Ŝaka terminareto. — Kompreni 3 (n-ro 20): 5, 1948.

## E—4. Fonetiko

[BUTLER, M. C.]: Notes on Esperanto pronunciation. — Brit. Esp. 32 (n-ro 420—421): 194—196, (n-ro 422—423): 212—214, 1940.

EVENS, COLIN: Fonetika aŭ fonema? — Brit. Esp. 34 (n-ro 469—470): 120—121, 1944.

## E—5. Gramatiko

SZILAGYI, F.: Ĉu dekses? — Svenska Esp.-Tidn. 32 (n-ro 5): 36—37, 1944.

### E-541.1. Ĝeneralaj leĝoj de la morfologia evoluo. Vortfarado

BOUCON, H.: Pri la prefikso ek. — Franca Esp. 8 (n-ro 62): 13, 1940.

### E-541.2. Vortsenco. Semasiologio

BAILEY, WILLIAM: Pri la radiko »domaĝ«. — Brit. Esp. 32 (n-ro 419): 187, 1940.

# REFERATOJ • RECENZOJ

D-ro W. MANDERS: *Interlingvistiko kaj esperantologio.* J. Muusses. Purmerend [Nederlando] 1950. 77 p. 8°. 2,25 ned. guld.; £ —.5.—; $ —.75.

En 1947 la aŭtoro doktoriĝis per detala studo, »Vijf Kunsttalen« (kvin artefaritaj lingvoj), en kiu li interkomparis la lingvojn Volapük, Esperanto, Ido, Occidental kaj Novial. Meritplene li en tiu studo analizis kelkajn ĉeftrajtojn en tiuj lingvoj. Kritike li pritraktis ĉiun el la lingvoj uzante kiel kriterion ĉe la prijuĝo la gradon de konformeco al tiuj gvidaj principoj, diferencaj de lingvoprojekto al lingvoprojekto, surbaze de kiuj ĉiu a p a r t a el la menciitaj planlingvoj estas konstruita. Kio en lingvo A estas bona surbaze de ĉi t i e s principoj, tio eble estas malbona en lingvo B juĝate el la gvidprincipoj de t i u ĉi lingvo.

Tiu klara distingo inter je unu flanko la problemo pri starigo de fundamentaj principoj por konstruado de helplingvo kaj je la alia flanko la variado de konkretaj solvoj surbaze de iuj starigitaj gvidprincipoj, estas esenca en la rigardmaniero de MANDERS. Kaj espereble tiu rigardmaniero helpos purigi la aeron inter la ofte akre disputantaj interlingvistoj kaj esperantistoj — jen sendube unu el la ĉefaj celoj de la aŭtoro.

En sia nova libro MANDERS precipe sin turnas al la esperantistoj, ĉe kiuj li i. a. volas veki pozitivan intereson pri la teoriaj loboroj de la interlingvistoj. Ĉe ambaŭ grupoj, la adeptoj de Esperanto kaj la adeptoj de aliaj ĝin konkurantaj planlingvoj, oni trovas unuflankecon kaj antaŭjuĝojn direktatajn kontraŭ la argumentoj de la alia grupo. Tiu ĉi libro volas antaŭenigi la objektivemon ĉe la planlingvanoj. Ke ĝi sukcesu pri tio!

La libro dividiĝas en du partoj: 1) Interlingvistika parto kaj 2) Esperantologia parto. La unua parto enhavas la ĉapitrojn: I. La interlingvistiko kaj Esperanto, II. La naturalismo de Edgar de Wahl kaj Otto Jespersen, III. La naturalismo de IALA. La dua: IV. Taskoj de la esperantologio, V. La evoluo de Esperanto. Lingva korekteco, VI. Kompara esperantologio.

La aŭtoro uzas la vorton interlingvistiko en ties malvasta senco. Kvankam tiu vorto tre taŭgus — kaj kelkfoje estis uzata — kiel ĝenerala termino ampleksanta la tutan terenon de planlingva scienco (do inkludante la esperantologion), li preferas — kaj certe prave — la originalan, striktan signifon, kiun donis al ĝi OTTO JESPERSEN (en »A New Science: Interlinguistics«, New York 1929). MANDERS sekve traktas interlingvistikon kaj esperan-

tologion kiel du diversajn sed parencajn branĉojn de la lingvoscienco[1]).

Pri la rilato de la interlingvistiko al Esperanto li diras, ke ĝis nun la interlingvistoj tro multe teoriumis — necesas, ke oni ne neglektu la praktikon. Jen la esperantologoj havas la avantaĝon, ke ili povas esplori la faktan lingvouzon de sia planlingvo. Abundas materialo. La interlingvistoj devus atenti la praktikan aplikon de Esperanto, ĉar »tio havigas al ili unikan ŝancon por ekzameni la pravecon de la kritikoj kontraŭ tiu lingvo kaj por fari konkludojn pri la praktika valoro de la propraj teorioj«.

La ĉefa tezo de la interlingvistaj kritikantoj de Esperanto estas, ke tiu ĉi lingvo estas tro neperfekta por iam ekesti ĝenerale aplikata. Al tio la aŭtoro respondas, ke »la solvo de la problemo dependas de multaj faktoroj, inter kiuj la lingvistikaj tute ne estas la plej decidaj«.

Por pritrakti »la naturalismon de de Wahl kaj Otto Jespersen« Manders uzas paralelajn tekstojn en Novial kaj Occidental, ĉerpitajn el la verketo »Discussiones inter E. de Wahl e O. Jespersen« (Chapelle-Vd., Svisio, 1935) — temas pri konciza raporto pri amikaj diskutoj, kiujn havis ambaŭ interlingvistoj en 1935 en Danio. Prijuĝante tiujn du plej elstarajn lingvojn de la naturalisma tipo Manders emfazas, ke vane oni serĉos ĉe Jespersen kaj De Wahl argumentojn por pravigi la vidpunkton, ke la internacia lingvo nepre havu maksimuman similecon kun la ĉefaj eŭropaj lingvoj, kaj ke helplingvo povas sukcesi nur, se ĝi pleje similas al la »naturaj« lingvoj.

Kaj li venas al tiuj ĉi konkludoj pri Novial kaj Occidental: 1) La vortfarado estas pli komplikita ol en Esperanto. Multaj prefiksoj kaj sufiksoj ne havas fiksan signifon — oni ofte devas elekti inter pluraj samsignifaj afiksoj. 2) »Tuja kompreneblo« estas bona, sed nur se oni atingas tion sen malprofito al tiuj, kiuj ne lernis fremdajn lingvojn. 3) »Naturaj« lingvoj en si mem ne estas pli bonaj ol aprioraj. Ekzistas neniu motivo por blinde preferi ĉion naturan — ĝuste la »naturaj« lingvoj estas ege kapricaj kaj arbitraj.

En la pritrakto de »la naturalismo de IALA« la aŭtoro redonas kaj komentas 11 kriteriojn koncerne al la strukturo de planlingvo donitajn de IALA (»Some Criteria for an international language and Commentary«, New York 1937). Kaj post konciza priparolo de la teknika prepara laboro farita de IALA li citas tekstojn el la publikigitaj lingvoprojektoj de tiu organizo: la variantoj »P«, »M«, »C«, »K« kaj »E«, kun tradukoj.

Atentinda estas lia konstato, ke la principo de homogeneco ofte konfliktas kun tiu de maksi-

---

[1]) Pri dezirata ĝenerala termino: oni povus uzi la vorton planlingvistiko, kiu do ampleksus kiel ĉefajn branĉojn interlingvistikon kaj esperantologion. P. N.

muma internacieco: la ĝerman-devenaj radikoj en la angla lingvo estas ofte pli internaciaj ol la latinidaj vortoj, kiujn IALA adoptis — ĉar multaj el ili troviĝas ankaŭ en la germana, nederlanda kaj skandinaviaj lingvoj, kiuj kune kun la angla lingvo havas disvastiĝon pli grandan ol la latinidaj lingvoj. Cetere liaj konstatoj kaj konkludoj en tiu ĉi ĉapitro estas: 1) IALA preferas naturalisman lingvotipon kaj evidente ne deziras planlingvon de la Esperanto-tipo. 2) La radikala naturalismo de la variantoj M kaj P estas nenecese malfacile lernebla al unulingvuloj. 3) »la modera naturalismo« de la variantoj C kaj E estas akceptebla se oni tezas ke la landoj kun okcidenteŭropa kulturo plej urĝe bezonas planlingvon, kaj ke la prefero por lingvo naturalisma bazita sur la latinidaj lingvoj ne estas arbitra, sed simple spegulas la mondampleksan signifon de la latina civilizacio. Ĉi tie mi volas nek defendi nek kontesti tiun duoblan tezon . . . . . « 4) La naturalismo estas danĝera principo, ĉar pri mil detaloj oni povas disputi, ĉu oni atingis maksimuman internaciecon. 5) »IALA agus saĝe kaj science se antaŭ ol fiksi la definitivan formon de sia lingvo ĝi entreprenus grandskalajn eksperimentojn kaj esplorojn por difini la respektivajn avantaĝojn de la naturalismo kaj skematismo«. Kaj li finas la ĉapitron jene: »La problemo ne estas pure lingvistika, kaj ĝian definitivan solvon oni ne atingos laŭ vojo pure teoria. Se IALA tion konscias kaj konforme agas, tiam ĝia nuna kaj estonta aktiveco neniel endanĝerigos la efektiviĝon de la planlingva ideo«.

En la »E s p e r a n t o l o g i a p a r t o« la aŭtoro donas utilan detaligon pri la taskoj de la esperantologio. Li kritikas — kaj ŝajnas al mi prave — mian tro unuflankan difinon pri la taskoj de la esperantologio donitan en la enkonduko de mia skizo, Paul Neergaard: La esperantologio kaj ties disciplinoj (en la libro Tra densa mallumo, Kopenhago 1942). En tiu enkonduko, kiun Manders citas, mi i. a. skribis, ke »la teoriaj diskutadoj de la lingvoprojektantoj formas metodon fremdan al la menso de la esperantistoj« kaj ke estu distingata de tiu teoriado »la teoria studado pri la konkreta praktikado« de Esperanto, kaj plue, ke la spertoj faritaj devas esti utiligataj por racie »gvidi la evoluon« de tiu ĉi lingvo. Pri tio mi nun volas diri, ke kvankam fakte la laboro de la interlingvistoj estas »fremda al la menso« de la sindonantaj esperantistoj, tiu kritika-analiza-eksperimenta laboro nepre ne devus esti senplue malsimpatia al la esperantologoj (kp. la finvortojn de la »Enkonduko« de tiu ĉi revuo, n-ro 1, p. 2). Kontraŭe, la esperantologo agus nescience, se li neatente preterpasus la laboraĵojn de la interlingvistoj. En tiu rilato la ĉefa afero estas, ke Esperanto ne estu eksperimentilo en la senco,

en kiu la interlingvistoj pritraktas la diversajn planlingvojn — kaj en tio MANDERS samopinias. Meritas citon la jenaj eldiroj de la aŭtoro pri la taskoj de la esperantologo: »La esperantologo kiu volas prijuĝi la valoron de Esperanto havas duoblan taskon: unue li devas esplori ĉu la baza zamenhofa ideologio estas ĝusta, kaj due li devas ekzameni ĉu Esperanto en ĉiuj detaloj konformas al tiu ideologio. La celo de tiuj esploroj ne estas proponi reformojn: ni nun troviĝas sur pure esperantologia tereno, kaj por la esperantologo Esperanto ne estas eksperimentilo, sed studobjekto. Ekzamenante ĉu la lingvaj elementoj kongruas kun la celoj kiujn Zamenhof aspiris, oni ne kontentiĝu per teoriaj rezonadoj: dank' al la pli ol 60-jara praktikado de la esperantistoj abundas la studmaterialo. Nur tiam ni atingos fidindajn rezultatojn, se oni kontrolos ĉiujn teoriojn pere de konstateblaj kaj registreblaj faktoj«.

Ke unu el la celoj (ne la sola celo) de la esperantologio estas »gvidi la evoluon« kiel eble plej racie, tio miaopinie estas evidentaĵo. Sed MANDERS tute ĝuste avertas kontraŭ perforta evoluigo kaj skribas: »la esperantologio agos prudente (kaj science) se ĝi provizore kiom eble detenos sin de ĉia gvidado. Da gramatikistoj ni havas pli ol sufiĉe, kaj oni bezonas legi nur la recenzojn por konvinkiĝi ke la esperantistoj ne rajtas plendi pri manko de gvidado. Anstataŭ miksi sin en la diskutojn pri gramatikistaj subtilaĵoj la esperantologoj turnu la atenton al la efektiva lingvouzo. La recenzistoj okupu sin pri la demando: »Kiel oni diru tion?« Por la esperantologo estas multe pli grava la demando: »Kiel oni kutimas diri tion?« kaj tial li atente observu la lingvon ne nur de aŭtoroj kaj eminentuloj, sed ankaŭ, kaj eĉ ĉefe. de la granda amaso. Tiel li povas esperi ke li malkovros la tendencojn, laŭ kiuj Esperanto evoluas (aŭ evoluus sen la interveno de la gramatikistoj), kaj se li krome sukcesos eltrovi la kialojn de tiuj tendencoj, tiam li atingis rezultaton, kiu interesos ĉiun lingviston kaj havos por Esperanto praktikan valoron. Nur tiam oni ja povas klare juĝi pri la demando ĉu la »natura« evoluo okazas laŭ la zamenhofa principo de maksikuma simpleco, kaj nur tiam evidentiĝos ĉu gvidado estas tiel necesa kiel multaj gramatikistoj kredas.«

Nu, bone, sed tio ne estas la tuta vero pri gvidado. Oni ne forgesu la taskojn, kiujn altrudas al la esperantologo la bezono pri fakaj terminaroj — ĝuste en tiu konstrua laboro necesas jam nun »gvidi la evoluon«. Kaj tiu laboro estas grava flanko de la esperantologio, kiun tute neglektas MANDERS en sia pritrakto (kaj ĉi-koncernaj problemoj de teknika lingvonormigo havas rilaton ankaŭ al la interlingvistiko, precipe al la ĉi-rilataj ebloj de la naturalisma principo).

Utilaj estas liaj konsideroj pri lingva korekteco surbaze de la normoj starigitaj de JESPERSEN por la prijuĝo de lingva korekteco (en lia »Mankind, Nation and Individual«, London 1946): la normoj aŭtoritata, geografia, literatura, aristokratia, demokratia, logika kaj estetika.

Kaj estas atentinda la sugesto de la aŭtoro, ke oni entreprenu komparajn studojn kun »naturaj helplingvoj«, ekz. kiaj »la angla kiel kongreslingvo, kiel komerca lingvo, kiel ĵamborea lingvo de la skoltoj, kiel scienca lingvo en internaciaj revuoj«, ĉar laŭcele tiuj lingvaĵoj estas parencaj al nia planlingvo.

Finiĝas la libro per komparaj analizoj de la lingvouzo en Esperanto kaj Occidental koncerne al la jenaj trajtoj: uzo de ye (prepozicio apriora, kiun transprenis Occidental kaj Novial el Esperanto: *je*); uzo de la prepozicio »de«; prepoziciaj esprimoj anstataŭ adverboj (tre interesa estas lia konstato, ke adverbaj esprimoj estas multe pli vaste uzata en Esperanto ol en Occidental); prepozicioj sekvataj de infinitivo. — La diferencoj, kiujn MANDERS trovas per tiuj ĉi esploroj, bone ilustras tion, kion li precipe celas montri, nome »ke la kompara esperantologio nur tiam atingos fidindajn kaj valorajn rezultojn, se ĝi ne kontentiĝas pri teoriaj spekulativaĵoj, sed ankaŭ observas la praktikan aplikon de aliaj planlingvoj.«

Tiu ĉi libro pri la fundamentaj problemoj de la planlingvistiko meritas la atenton de ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teoria studado de Esperanto kaj aliaj helplingvoj — jes, ĉiuj seriozaj praktikantoj de tiuj ĉi lingvoj devus ĝin legi. Kiel la enhavo estas instrua, tiel la prezentado de problemoj kaj konkludoj estas objektiva (ne tro ofta kvalito de planlingvistika verkaĵo) kaj plue tiel klara kaj simpla en vortelekto, ke al vasta publiko tiu ĉi traktaĵo povas servi kiel sobra enkonduko en la problemaron de la interlingvistiko kaj esperantologio.

PAUL NEERGAARD.

# NOTOJ

## Universitataj katedroj de Esperanto II[1])

**Aŭstrujo** (daŭrigita)

**Universitato Graz** (Karl-Franzens-Universität Graz). *Fondo de la katedro:* Laŭ propono de la profesoraro de la filozofia fakultato aprobita de la instrumin. per dekreto n-ro 72496/III—8/49 de 8. 12. 1949. *Fakultata aparteno:* Filozofia fakult. *Programo:* Du lecionoj posemajne. En la somera semestro 1950: enkonduko en la lingvon E. *Lektoro:* profesoro ADOLF HAINSCHEGG, direktoro de la Ŝtata Komisiono por ekzamenoj pri E. en Graz.

**Teknika Altlernejo, Graz** (Technische Hochschule, Graz). *Fondo de la katedro:* Laŭ decido de la profesoraro n-ro 2803/1/49/W de 10. 11. 1949, aprobita de la instrumin. per dekreto n-ro 72884-III/9/49 de 16. 1. 1950. *Programo:* Du lecionoj posemajne. En la somera semestro 1950: enkonduko en la lingvon E. *Lektoro:* profesoro ADOLF HAINSCHEGG.

**Hungarujo**

**Ĉeso de lektorato.** Profesoro ERNESTO FARKAS, lektoro de E. ĉe la *Universitato de Szeged,* informas, ke la Hungara Religia kaj Instrua Ministerio per decido de 18. 3. 1950, n-ro 1445—65—12/1950. VI. 1. ĉesigis pluan instruadon de E. en la Universitato de Szeged. Vane estis kolektiva protestskribo al la ministerio. Ĝuste nun, kiam la esperantlingvaj prelegoj montriĝis pli promesaj kaj evolukapablaj, oni ĉesigis. Dum la pasinta studduonjaro partoprenis 25 gestudentoj. Krome 15 gastlernantoj vizitis la prelegojn.

**Japanujo**[2])

**Fremdlingva Kolegio de la Urbo Kobe.** *Fondo de la katedro:* post la milito. *Fakultata aparteno:* Kulturscienca fakultato. *Programo kaj rajtigo:* la kurso (»2 unuoj«) estas deviga. *Lektoro:* profesoro Y. NUKINA.

**Osaka Fremdlingva Kolegio (Ŝtata).** *Fondo de la katedro:* post la milito. *Fakultata aparteno:* la instruado okazas kiel kurso el specialaj studoj. *Lektoro:* profesoro NAOKAZU KAWASAKI. *Aldona informo:* La kolegio ĵus vicigita inter universitatoj havis en sia instruprogramo instruadon de E. ankaŭ ĝis nun, kiam ĝi estis duagrada kolegio.

**Otani Universitato (budaista).** — *Fondo de la katedro:* post la milito. *Fakultata aparteno:* Kulturscienca fakult. *Programo kaj rajtigo:* libera kurso. *Lektoro:* profesoro F. DAZAI.

---

[1]) Universitataj katedroj de Esperanto I: Esperantologio I: 77—80.

[2]) Informoj el Revuo Orienta 30 (n-ro 7): 212, 1949.

**Harry Mylén.** En oktobro 1949 mortis pro kormalsano HARRY MYLÉN, Malmö, kiu en modela maniero prizorgis la peradon de Esperantologio por Svedujo. Ni perdis en li, juna kaj vigla kun multaj interesoj, homon de eksterordinare simpatia karaktero — lin tre malhavas liaj multaj esperantistaj amikoj.

PAUL NEERGAARD.

# Ricevitaj publikigaĵoj

## I. Libroj kaj broŝuroj

*2. Religio. Teologio.*

Ludvig Thalmaier: Al altaro de Dio. Katolika preĝlibreto en Esperanto. Katol. Esp-o Centro en Germanio, München 1949. (43 p.).

*3. Sociaj sciencoj. Juro. Mastrumado.*

Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Trad. Jaroslav Marik. Instituto de Esp-o-servo en Praha, 1948. Biblioteko vol. 1. (72 p.).

*4. Filologio. Lingvoscienco.*

*408.9. Planlingvistiko.* J. Régulo Pèrez: Joaquin Carreras y Artáu: De Ramón Lull a los modernos ensayos de formacion de una lengua universal. Seperata da Revista Portuguesa de Filologia vol. 2. Coimbra 1949. (3 p.) — *408.92. Esperanto (= E).* M. Fernández Menéndez: El Esperanto en la opinión de hombres eminentes y diversos hechos. 2a edición. La bona semisto, Montevideo 1949. (32 p.). — Die Sprache als Mittel der Weltkultur. Wesen und Möglichkeiten der Weltsprache Esperanto. Esp-o-Verein Reutlingen 1948. (31 p.). — Jozefo Joels: Panoramo de nia movado. Kolekto Nova Vojo. Rio de Janeiro 1948. (15 p.). — C. Støp-Bowitz & J. R. G. Isbrücker: La Esperanto-movado, ĝia historio, organizo kaj nuna stato. Esperantoforlaget A/S, Oslo 1948. (61 p.). — *E-07. Instruado.* Manuel Fernández Menéndez: Valor educativo del Esperanto. Estudio ilustrado con 10 fotograbados. Imprenta Nacional, Montevideo 1949. (39 p.). — Pierre Bovet & Henriette Ith: Enketo pri internacia helplingvo. Sveda Esp-o-Federacio, Stockholm 1949. (32 p.). — Vilho Setälä: Taglibro de kongresano. Turisma paroligilo por nova esperantisto. Eldono Vilho Setälä, Helsinki 1949. (24 p.). — Delfi Dalmau: Ilustrita Lernolibro de Esperanto por praktika komenca kurso. Barcelona. Aperjaro neindikita. (25 p.). — Montagu C. Butler: Step by step in Esperanto. A simple textbook and reader. The Esp-o Publ. Co. Ltd. Seventh edition, London 1948. (280 p.). — Jozefo Seka: Esperanto por komencantoj. Esperanto für Anfänger. Esp-o Eldonejo Heinrich Harasin, Mainz 1948. (46 + 5 p.). — J. Weber: Pri la stiloj de poezio kaj prozo en Esp-o kun historia resumo de la mondhelplingva ideo. Hamburg 1949. (represo p. 97—124 el »instruleteroj«). — August Weide: Esperanto erlernen — die Sprachmauern entfernen! Lehrbuch der Welthilfsprache. Verlag Freie Gewerkschaft G. m. b. H., Hamburg 1948. (84 + 3 p.). — Dro Esperanto: Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro por rusoj. Varsovio 1887. Faksimile represita en 250 numerigitaj ekzempleroj. Eldono Vilho Setälä, Helsinki 1948 (48 p. + faldita folio). — *E-2. Parolpartoj.* Kenji Ossaka: Numeraloj kaj nombrovortoj. Osaka Esp-o-Biblioteko 1948. (66 p.). — Kenĵi Ossaka: Esperantaj interjekcioj kaj onomatopeoj. Osaka Esp-o-Biblioteko 1948. (48 p.). — *E-54. Etimologio. Vortkunmetado. Vortderivado.* Naokazu Kawasaki: Kunmetitaj vortoj el Zamenhofaj verkoj. Osaka 1949. (162 p.). — *E-56. Sintakso.* Daniel Quarello: Komplementoj de l' substantivo. Lernu Esperanton II (p. 35—62). — Quarello & Cia. Buenos Aires 1948. — Daniel Quarello: Komplementoj de l' verbo. Lernu Esperanton III (p. 63—97). Quarello & Cia, Buenos Aires 1949.

*5. Matematiko. Natursciencoj.*

*51. Matematiko.* L. Oterma: 5-decimalaj valoroj de x — sin x, sin x, cos x, tg x kun x en radianoj. Astronomia Observatorio de Universitato de Turku. Helsinki 1948. (9 p.). — Hermann Wagner: Internacia Logaritmo-tabelaro [Siegfried Ziegler Eldonejo, München-Pasing 1949]. (6 + 2 p.). — *54. Kemio.* Curt Dellian: Racia kaj internacia kemia nomenklaturo. Kritikaj studoj pri la sistematiko kaj logiko de la kemia nomenklaturo. Esp-o-Centro, Inĝeniera sekcio, München 1948. (36 p.). — *59. Zoologio.* C. Støp-Bowitz: Pelegaj poliĥetoj de la norvegaj antarktaj ekspedicioj de la »Norvegia« 1927—1928, 1928—29 kaj 1930—1931. Resumo en Esp-o. Oslo 1949. (2 p.). — C. Støp-Bowitz: Poliĥetoj de la »Michael Sars« NordAtlan-

ta profundmara ekspedicio 1910. Resumo en Esp-o. Bergen 1948. (4 p).

*7. Arto. Ludo. Sporto.*

*77.04. Fotografia arto.* Vilho Setälä: Burĝonoj. Infanoj en poezio kaj fotografio. Fotografa preso sur luksa papero. Eldono Vilho Setälä, Helsinki 1950 (80 p., 21×29 cm, bindita kun tola dorso). — *78. Muziko.* Ŝetiaro Ŝindo: Esperantista kantareto (kun 8 noto-folioj). Osaka 1948 (10 + 16 p.).

*8. Beletristiko.*

*830. Germana.* Goethe: Faŭsto I. Esperanta traduko de N. Bartelmes. Dua eldono. Siegfried Ziegler Eldonejo, München-Pasing 1949. (190 p.). — Max Butin: Faŭsto. Konciza Komentario al Faŭsto I. Siegfried Ziegler Eldonejo, München-Pasing 1949. (18 p.). — *840. Franca.* Jean de la Fontaine (trad. Lucien Thévenin): Fabloj. Eldono de Kompreni, Lyon 1948. (84 p.). — Alphonse Daudet (trad. Mijake-Ŝihej): Leteroj el mia muelejo (kajero 1). Internacia Biblioteko de JEI-1. Japana Esp-o-Instituto, Tokio 1949. (79 p.). — *89.08.92. Originala.* James Sayers: Invito al ĉielo. Romano originale verkita en Esperanto. Siegfried Ziegler Eldonejo, München-Pasing 1949 (205 p.). — P. Brikisto: Der Mann im Vorzimmer und andere Geschichten von Zeitgenossen. Aus dem Esperanto übertragen von Siegfred Ziegler. Siegfried Ziegler Verlag, München-Pasing 1949. (85 p.).

## II. Periodaĵoj

*05. Ĝeneralaj gazetoj.* Monda Revuo (Rossauerlände 27, Wien IX, Aŭstrujo). — *2. Religio. Teologio.* Dia Regno, Kristana Gazeto Internacia (Erik Carlèn, Hällabrottet, Svedujo). — Semisto, Informilo de la Katolika Esp-o-Centro en Germanio (Mittermayrstrasse 18, München 13). — *3. Sociaj sciencoj. Juro. Mastrumado.* La S. L. P.-Folio (Deleonismo), eld. aŭspicie de la Socialista Lab. Partio Usona (61 Cliff St., New York 8, N. Y., Usono). — *4. Filologio. Lingvoscienco.* Linguist, French-German - Spanish - English - Italian - Russian-Esp-o (The Linguists' Club, 20 Grosvenor Place, London SW1, Britujo). — *408.92. Esperanto.* American Esp-o Magazine. Oficiala Organo de la Esp-o-Asocio de Nord-Ameriko (G. Alan Connor, 114 West 16th Street, New York 11, N. Y., Usono). — Arbetar Esp-isten (Svenska Arbetar-Esp-o-Förbundet, Barnhusgatan 8, Stockholm, Svedujo). — Boletin (Federacion Espista Espanola, Ruzafa 7, Valencia, Hispanujo). — The British Esp-ist (The British Esp-o Association, Inc., 140 Holland Park Avenue, London W11, Britujo). — Dansk Esp-o-Blad (Centra Dana Esp-ista Ligo, ekspedejo: Kurt Pedersen, Yrsavej 17, Kopenhago F, Danujo). — Esp-a Finnlando (Onnentie 23, Helsinki-Kä, Finnlando). — Esp-ista Revuo por Esp-o en Ĉeĥoslovakio (Esp-o-Asocio en ĈSR. Praha II, Malá Štepánska 7, Ĉeĥoslovakujo). — Esp-isto Slovaka, Organo de Slovaka Esp-o Instituto. (T. S. Martin, Kuzmány-str. 29, ĈSR-Slovakujo). — Esp-o-bladet, Norvega Esp-isto (Esperanto-forlaget A/S, Boks 942, Oslo, Norvegujo). — Esperanto-Post, Mitteilungsblatt der Esp-o-Freunde in Deutschland (Gustav Göller Verlag, Unter Fettenhennen 11, Köln, Germanujo). — Laborista Esperantisto (organo de FLE, red. kaj adm.ejo: Roelantstr. 4, Amsterdam W, Nederlando). — La Progresanto (studgazeto de FLE, red. kaj adm.ejo: G. J. Degenkamp, Roelantstr. 4, Amsterdam W, Nederlando). — La Ponto, Oficiala revuo de Germana Esp-o-Asocio (13b) München-Pasing, Engelbertstrasse 7, Germanujo). — La Revuo Orienta (Japana Esp-o-Instituto, Tokio-Hongo-Motomaĉi, Japanujo). — La Rondo, Oficiala Organo de la Aŭstralia Esp-o-Asocio [ricevita nekomplete] (2 Banchory St., Essedon, W. 5. Victoria, Aŭstralio). — Usona Revuo (Interlanguage Foundation Inc., 1018—20 W. Lincoln Ave, Milwaukee 15, Wis., Usono). — *5/6. Matematiko. Natursciencoj./ Aplikitaj Sciencoj. Tekniko.* La interligilo, Oficiala Organo de la Int. Ligo por Esp-o en Poŝto, Telekomunikoj kaj Transportoj (46 Rue Lamartine, Paris IXe, Francujo). — Scienca Revuo, Oficiala Organo de Int. Scienca Asocio Esp-ista (J. Muusses, Purmerend, Nederlando). — Scienca Rondo, Oficiala Organo de la ISAE-ĉefdelegito por Germanio (Esp-o-Centro, Inĝeniera Fako, poŝtfako 47, München 23, Germanujo). — Scienco kaj Tekniko, Oficiala Organo de la Brita Esp-a Scienca Asocio (E. D. Durrant, 15 Beaufort Road, Reigate Surrey, Britujo).

Finpresita 8. de junio 1950

## Landaj perantoj

**Suplemento kaj korektoj**

al la listo publikigita dorsflanke sur la kovro de n-ro 1.

**Novaj perantoj. Adresŝanĝoj:**

AŬSTRUJO (50 ŝil.): S-ro G. Katzianka, Rossauerlände 27, Wien IX. *Poŝtĉekkonto: 182.665.*

BELGUJO (225 belgaj fr.): Flandra Esperanto-Instituto, Diepestr. 44, Antwerpen.

BRITUJO (25 sh.): S-ro John C. Rapley (provizora peranto), 86 Buckthorne Road, Brockley, London SE 4.

HISPANUJO (75 pesetoj): S-ro Delfi Dalmau, Lauria 98, Barcelona.

ITALUJO (3400 liroj): Esperanto-propaganda Centro, Casella Postale 1175, Milano. *Conto corr. postale 3/10262.*

JUGOSLAVUJO (250 din.): Slovenia Esperanto-Ligo, Cankarjevo Nabrežje 7/I, Lubljana.

SVEDUJO (20 sv. kr.): S-ro Erik Andersson, Rörsjögatan 14, Malmö. *Postgirokonto: 39108.*

**Prezo de ESPERANTOLOGIO.**

La baza kotizo por unu volumo 250—300-paĝa estas 5 usonaj dolaroj. La kotizo estas en aliaj valutoj indikita kun rezervo rilate kurzŝanĝojn.

Pro la devaluo de septembro 1949 la kotizo en diversaj valutoj devis esti ete ŝanĝataj, tiel ke la kotizo en tiuj valutoj nun estas: Britujo 25 sh., Bulgarujo 1200 levoj, Danlando 25 d. kr., Finnlando 800 f. mk., Japanujo 1200 en., Nederlando 14 guldenoj, Norvegujo 25 n. kr. kaj Svedujo: vidu supre. La ceteraj kotizoj indikitaj en n-ro 1 restas validaj.

A/S Modersmaalet—Haderslev